

revuo

esperanto

februaro 1965

58-a jaro

n-ro 711 (2)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 21 Ni reviziu nian delegitan reton (Jaumotte)
- 22 Pri la agado de la lokaj grupoj:
 - 1. La rolo de la lokaj E-societoj por realigo de la dua baza laborplano de UEA (Lapenna)
- 25 Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado
- 26 La hejma uzado de nia lingvo (Moravec)
- 28 Nikko, Japanujo (Isobe)
- 30 Pachinko (fabelo, sed ne tro...) (G.G.P.)
- 31 Recenzoj
- 32 Ricevitaj eldonaĵoj
Citaĵoj
- 33 Mallongaj novaĵoj
- 34 La Juna Vivo
- 35 Int. Junularkonferenco Anne Frank 1965
- 36 50-a Universala Kongreso, Tokio, 1965
La internacia ekzameno
Memoriga kalendaro
- 37 Esperanto en radio
La poŝtmarkkolektado
En la grupoj
Nekrologoj: Baff, van Heek
- 38 Oficiala informilo n-ro 376
La internaciaj konkursoj 1964
Statistiko
- 40 Anoncetoj

kovrila bildo

Ekspozicioj de infandesegnaĵoj kolektitaj per Esperanto ĉiam vekas grandan interesigon: ĉi tiu okazis en Ĉeĥoslovakio.

fotojn liveris

- 26 Mulder
- 28 Japana Nacia Turisma Asocio
- 31 Stafeto
- 33 Esperanta Finnlando

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88. Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1965): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 84 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass. 02138, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



NI REVIZIU NIAN DELEGITAN RETON

ĉefartikolo de la
estrarano pri landaj
kaj fakaj asocioj

**Maurice
Jaumotte**

Ciujare mi kun ioma fiereco trafoliumas — tuj post ricevo de la nova Jarlibro — la tricent paĝojn dediĉitajn al la publikigo kaj katalogigo de la delegitoj kaj fakdelegitoj, kiuj, ĉie en la mondo, deklaras sin pretaj helpi aliajn membrojn kaj samtempe demonstracias la universalecon de nia lingvo — kiu ne nur havas reprezentantojn ĉie, sed kies reprezentantoj apartenas al ĉiuj kategorioj de civitanoj, al ĉiuj profesioj kaj metioj, al ĉiuj religioj kaj filozofioj, kaj kiuj interesiĝas pri la plej diversaj aferoj.

Temas ja pri proks. 3000 delegitoj en sesdeko da landoj, kiuj priatentas 168 fakojn !

Kiam mi, antaŭ kelkaj monatoj, iĝis estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, mi tuj re-trafoliumis la Jarlibron... sed ĉion eble rigardis per aliaj okuloj ol mi faris ĝis nun. Kaj tuj evidentiĝis al mi, ke — se certe la nombro de delegitoj, vicdelegitoj kaj fakdelegitoj estas grava — io tamen ŝajnas ne en ordo kaj io estas do farenda por akiri pli bonan ordigon, pli grandan efikecon de la komune farita kaj farota laboro.

Kiam oni atente trafoliumas tiujn tricent paĝojn, oni unuavice konstatas, ke, ekzemple, en momento kiam ni grandskale agas por akiri de UN aŭ Unesko, ke ili "rekomendu... al la Ŝtatoj-Membroj progresigi la instruadon de Esperanto kaj stimuli ĝian uzon en la internaciaj rilatoj de la popoloj", estas landoj, kiuj havas fakdelegitojn pri edukado-instruado... nur en UNU urbo: Argentino, Aŭstrujo, Koreujo, Maroko, Portugalujo kaj Urugvajo; aliaj en nur DU: Ĉeĥoslovakujo, Hispanujo; aliaj en nur TRI: Japanujo, Norvegujo, Polujo, Sovetunio...

Inter tiuj landoj certe estas kelkaj, kie nia movado eble ne estas tre forta; sed estas inter ili aliaj, pri kiuj ne povas ekzisti dubo, ke tre facile oni povus trovi dekoble pli da instruantoj diversgradaj, kiuj pretus helpi, se nur *iu* bonvolus al ili klarigi la gravecon de jena fakto: se nun ministro pri edukado-instruado petus enrigardi nian Jarlibron, li konstatus, ke mankas delegito pri lia fakto en pluraj ĈEFurboj kaj aliaj internacie konataj urbegoj: en Bern kaj en Bruselo; en Berlino kaj Bonn, en Parizo kaj Praha; en Tokio kaj Washington; same kiel en Amsterdam, Antwerpen kaj New York, por citi nur kelkajn !

En la turismo ekzistas simila anarkio... Ni havas fakdelegitojn en kelkaj vilaĝoj, pri kiuj eble neniu iam aŭdis, kiujn eble neniam *iu* vizitos: mi pensas, en propra belga lando,

pri "Bersillies-le-Château", beleta vilaĝeto, tute ekster la turismaj vojoj; dum mia ĉefurbo Bruselo ne estas menciita... Same mankas, en Aŭstrujo: Wien; en Ĉeĥoslovakujo: Praha; en Danlando: København, por citi nur ĉefurbojn famajn kaj allogajn... Sed mankas krome tiom da belegaj turismaj centroj, ofte apudaj tamen al urboj, kie ni certe havas ne nur esperanto-parolantojn, sed individuajn membrojn de UEA, al kiuj estus tiel simple antaŭmeti delegitan formularon !

Kion konkludi el tiuj du ekzemploj ? Tut-simple ke, ĝis nun, iĝis fakdelegito la bonvoleculo, kiun — hazarde ĉe l' pago de individua membreco — *iu* atentigis pri la ekzisto de fakaj delegitecoj... sed ke preskaŭ nenie kampanjo estis organizita de la lokaj grupoj aŭ de la landaj asocioj por iom *plani tiun servon*, por atingi, ke en tiu parto de nia Jarlibro, en kiu oni resume vicigas la delegitojn, laŭfakte kaj laŭlande, oni trovu kvazaŭ respegulon de la geografia mapo aŭ situacio de la lando.

Antaŭ tri kvar monatoj ni, per specialaj cirkuleroj, atentigis la landajn asociojn kaj la ĉefdelegitojn tutaparte pri tiuj du fakoj kaj pri ilia nepre necesa reorganizo.

Ni samtempe atentigis ilin pri nova, nuntempe necesega fakto, kiun ni nomis "SOS-aŭto-servo". Tiun fakon akceptos tiuj homoj, kiuj — ĉu posedantoj aŭ ne de aŭtomobilo, ĉu teknikistoj aŭ ne-teknikistoj — tutsimple pretas dum la turisma sezono senpaneigi aŭtanton, kiu havas difekton survoje en la proksimeco de la loĝloko de tiu fakdelegito; kiu do, tiucele, antaŭesploros iome la garaĝistan kaj riparejan sektoron de sia regiono, tiel ke li, ĉe telefona SOS-alvoko de eksterlanda membro, povos TUJ averti la plej apudan kaj kompetentan garaĝiston, por ke li helpu la malfeliĉan amikon.

Ni esperas, ke tiuj tri kvar monatoj sufiĉis, por ke ĉiu en sia rondo nun jam estu eklaborinta; tiel ke, kiam ni ricevos la Jarlibron 1965 kaj speciale atentos la tri menciitajn fakojn de instruado-edukado, de turismo kaj de la SOS-aŭtoservo, ni kun pli da feliĉo ol da fiereco povos konstati, ke nia alvoko ne estis nur "voĉo krianta en dezerto"... sed ke multaj membroj ekkonsciis pri la graveco de nia peto.

Kaj ni, kun dankemo, vidos en tiu fakto klaran indikon, ke la landaj asocioj kaj ĉefdelegitoj volas komisi nin, ankoraŭ pli funde esplori la tiurilatan situacion kaj disvolvi nian laboron *en la fakoj* — kiuj estas vere gravaj, pli gravaj, ol multaj pensas. Tiel gravaj, ke, nun jam, nia intenco estas plivigligi ankoraŭ niajn klopodojn de reorganizo de jam ekzistantaj fakoj kaj de kreo de novaj.

esperanto
februaro 1965

1 LA ROLO DE LA LOKAJ ESPERANTO-SOCIETOJ POR REALIGO DE LA DUA BAZA LABORPLANO DE U.E.A.

La celo de la organizita neŭtrala Esperanto-Movado estas ĝeneraligi la uzon de la Internacia Lingvo en ĉiuj internaciaj rilatoj, kaj samtempe, paralele kun la progresado en tiu direkto, kreadi kiel eble plej favorajn kondiĉojn por maksimuma utiligo de la lingvo jam en la nuntempo. Respegulante la organizan strukturon de la hodiaŭa Esperanto-Movado, la Dua Baza Laborplano de UEA, akceptita de la Komitato en 1962⁽¹⁾, indikas la taskojn de niaj organizaĵoj sur la internacia, landa kaj loka niveloj, kiel ankaŭ en la fakaj branĉoj, por atingi iom post iom la celon kaj por doni tuj kiel eble plej grandan avantaĝon al ĉiuj, kiuj scias la Internacian Lingvon. La Plano prenas en konsideron la disponeblajn homajn fortojn kaj la materiajn eblecojn de UEA kaj de la organizaĵoj apartenantaj al ĝi. Tial ĝi estas realeca. Tamen, la pli aŭ malpli rapida efektivigo de la Plano dependas multe ne nur de faktoroj eksteraj, sed ankaŭ de internaj, el kiuj la plej esenca estas tiu, kiun oni povus koncize difini unueco en diverseco: ju pli unuece ni agos por la sama celo sur diversaj kampoj, des pli rapide ni progresos; inverse, ju pli ni disrompos niajn fortojn, trenante ĉiu al sia propra direkto kaj forrabante tiel energiojn kaj rimedojn for de la fundamentaj taskoj, des pli malfacila estos la irado antaŭen. Tiom tute principe.

Ekde la fondiĝo de la unua Esperanto-societo en Nürnberg en 1888, la lokaj grupoj ĉiam ludis kaj plue ludas unuarangan rolon. Ili troviĝas en la bazo mem de la tuta organizita agado por la Internacia Lingvo. Loka Esperanto-societo povas plej efike organizi en sia urbo aŭ distrikto la tri ĉefajn aspektojn de nia tuta aktivado, nome la informadon, la instruadon kaj la praktikajn aplikojn. De la celtrafa laboro de la lokaj societoj grandparte dependas la forto kaj karaktero de niaj landaj asocioj, fakaj organizaĵoj kaj UEA. Estas, ekzemple, tute klare ke nek UEA, nek la plej bonaj landaj asocioj aŭ fakaj organizaĵoj, povas kontentige progresi, nome plenumadi siajn taskojn laŭ la Laborplano, se la lokaj Esperanto-societoj ne kontribuas sian parton. Ĝuste pro tiu eksterordinara graveco de la lokaj Esperanto-societoj, la Laborplano dediĉas al ili apartan atenton en la punktoj 13 kaj 26, kaj la Estraro de UEA decidis publikigi en "Esperanto" serion da artikoloj kun sugestoj por plia sistemigo, kvalita bonigo kaj, sekve, efikigo de ilia laboro.

Organizaj Demandoj

La Dua Baza Laborplano de UEA detaligas la taskojn de la centraj organoj de nia monda Asocio, sed intence evitas fari la samon por la landaj, lokaj kaj fakaj organizaĵoj, kiuj

devus, konforme al la ĝenerala ideo de la Laborplano kaj al siaj propraj konkretaj celoj kaj eblecoj, ellabori siajn planojn de agado. Por helpi ilin orientiĝi kaj trovi pli facile sian lokon en la tutmonda agado direktita al la sama celo, la Laborplano nur mencias la plej esencajn erojn, lasante al la landaj asocioj, fakaj organizaĵoj kaj lokaj grupoj ellabori la detalojn.

Antaŭkondiĉo de sukcesa laboro estas taŭga kaj forta organizo, konforma al la celo, kiun oni deziras atingi. Trovinte tiun formon, la organoj de la loka societo devas klopodi fortikigi ĝin per membrigo de ĉiuj novaj esperantistoj kaj de tiuj malnovaj, kiuj ankoraŭ troviĝas ekster ĝiaj vicoj. Tion oni povas fari diversmaniere, ekzemple per ĝenerala alvoko en la loka gazeto al ĉiuj esperantistoj aliĝi al la societo, per membrigo de la kursfinintoj, kiuj ekregis la lingvon, per speciala letero direktita al la malnovaj esperantistoj k.s. Tre grave estas ellabori agadplanon de la societo kaj komuniki ĝin al ĉiuj, kiujn oni deziras membrigi, ĉar ili devas scii kion la loka grupo deziras atingi, per kiuj rimedoj kaj kiel la adresito povas efektive helpi kaj ne nur perdi sian tempon. Se iel eble, ĉiu loka grupo devus akiri propran ejon kaj organizi kiel eble plej oftan deĵoradon, tiel ke ĉiu membro kaj ĉiu interesiganto povu ricevi la necesajn informojn. Eĉ se la loka grupo ne sukcesas akiri propran ejon, en ĉiu okazo ĝi devus havi sian bibliotekon kaj aboni almenaŭ kelkajn revuojn, inter kiuj la landan organon kaj la periodaĵojn de UEA "Esperanto", "Monda Kulturo", "Kontakto", "La Praktiko". Konsiderante la eksterordinaran gravecon de la junularo por la estonteco de la Esperanto-Movado, ĉiu loka grupo devus organizi sendependan junularan sektion aŭ apartan junularan grupon, aŭ doni kiel eble plej grandan apogon al la jam ekzistanta junulara sekcio aŭ grupo. Necesas kompreni, ke la junularo havas siajn proprajn ideojn, konceptojn kaj interesojn. Tial, ju pli memstare ĝi laboras por la Internacia Lingvo kaj utiligas ĝin por siaj propraj celoj, des pli da pozitivaj rezultoj ĝi atingos. La brila laboro de TEJO en la lastaj jaroj kaj la multnombraj vere elstaraj aranĝoj, kiujn ĝi aŭ unuopaj ĝiaj sekcioj organizis en diversaj landoj, klare montras, ke la Esperantista junularo estas pli ol matura por mem prizorgi siajn organizaĵojn kaj pere de ili celtrafe labori por la Internacia Lingvo en la junularaj medioj.

La loka Esperanto-societo havas ankaŭ aron

⁽¹⁾ Publikigita en "Esperanto", oktobro 1962, kaj ricevebla senpage de la C.O. de UEA.

da aliaj organizaj taskoj. Ekzemple, ĉiu loka grupo devus aligi ĉiujn siajn membrojn al la landa asocio kaj varbi kiel eble plej multajn individuajn membrojn por UEA. Ĝi ankaŭ devus prizorgi, ke en la loko de la societo kaj en la apudaj lokoj estu Delegitoj de UEA, eventuale Vicdelegitoj kaj kiel eble plej multaj Fakdelegitoj, precipe por la plej gravaj fakoj de scienco, edukado kaj kulturo. Kiam la lokaj grupoj fariĝas sufiĉe fortaj kaj havas membrojn en diversaj partoj de urbegoj aŭ en la proksimaj urbetoj kaj vilaĝoj, ili devus formi aŭ sekciojn aŭ novajn societojn en tiuj distriktoj aŭ lokoj, en kiuj la nombro de esperantistoj ebligas fondon de nova loka grupo. La multjaraj spertoj montras ke la granda plimulto de la lokaj Esperanto-societoj atingas ĝis 60-80 membroj, malofte ĝis 300, kio necesigas la kreon de novaj sekcioj aŭ societoj ĉu laŭ la teritoria kriterio, ĉu laŭ la profesia aŭ faka.

Eĉ la plej perfekta struktura organizo de loka grupo kaj ĝia plej konscienca daŭra solvado de organizaj demandoj per si mem neniel signifas fruktodonan laboron. Kontentigajn rezultojn kun daŭra valoro povas doni nur paralela, bone studita kaj celkonscia agado sur la kampoj de informado, instruado kaj praktika utiligo.

Informado

La informado devus rigore observi la t.n. Principaron de Frostavallen, kiun akceptis la kunveno de la reprezentantoj de la landaj Informaj Fakoj la 30-an de julio 1956.²⁾ Precipe necesus atenti al evitado de eraroj. Multaj niaj organizaĵoj, kiuj agas laŭ la menciita Principaro, atingas bonegajn rezultojn. Aliaj, kies respondecaj funkciuloj aŭ entute ne legis la Principaron, aŭ superece malatentas ĝin kiel negravan aŭ eĉ sensignifan, plue detruas la laboron de aliaj kaj kompromitas la lingvon kaj la seriozecon de la Esperanto-Movado. Eraro estas, ekzemple, nomi Esperanton "artefarita", "helpa", "verda" k.s. anstataŭ tutsimple "La Internacia Lingvo" aŭ "Esperanto". Eraro estas superflue menciadi diversajn projektojn de komuna lingvo, aŭ, se nepre necese, ne distingi nete inter Esperanto kiel vivanta lingvo kaj tiuj projektoj, kiuj neniam eliris el la komenca stadio de provo. Eraro estas uzi en nacilingvaj tekstoj — kaj, laŭ mi, ankaŭ en la Esperantaj — esprimojn kiel "samideano", "Majstro", "verdestelanoj", "verda popolo" k.s. Eraro estas doni al la Esperanto-Movado sektecan karakteron per tro multe da steloj kaj flagoj, kantado de la himno kaj aliaj kantoj en nekonvenaj tempo kaj loko, perforta altrudado de Esperanto anstataŭ objektiva informado k.s. La eraroj en la informado malproksimigis de Esperanto dekmilojn da personoj kaj kaŭzis fortan kompromitiĝon de la Movado en multaj medioj. Feliĉe, en la lastaj kelkaj jaroj tiuj eraroj

konsiderinde malpliigis, sed malfeliĉe ili ankoraŭ ne estas plene forigitaj el niaj vicoj. Nur observado de la Principaro de Frostavallen, tute speciale rilate la kvaliton de informado, donos la deziratajn rezultojn ĉie en la mondo, kiel ĝi donis en tiuj landoj aŭ regionoj, en kiuj ĝi estas aplikata. En niaj kongresoj kaj en la Esperanta gazetaro sufiĉe ofte oni aŭdas kaj legas pri la neceso agi laŭ "novaj metodoj". Ne temas pri tio. La metodoj sugestitaj de UEA en la Baza Laborplano, Principaro de Frostavallen kaj aliaj dokumentoj estas bone pristuditaj, taŭgaj, konformaj al la objektivaj eblecoj de la nuntempa Esperanto-Movado. Temas efektive pri tio, ke aŭ entute neniam metodoj estas aplikataj en multaj kazoj, aŭ ke la metodoj sugestitaj ne ĉiam estas observataj.

Instruado

La celo de la informado estas objektive diskonigi la Internacian Lingvon kaj ĉion, kio estas kreita en ĝi aŭ pere de ĝi; detruoj la antaŭjuĝojn, precipe en la ŝlosilaj pozicioj de la kulturo kaj de la publika vivo; instigi al lernado de la lingvo kaj sekve multigi la nombron de personoj, kiuj ĝin parolas.

Ĉiu loka grupo devus malfermi almenaŭ unu kurson por komencantoj ĉiujare. En la landoj, en kiuj oni relative facile akiras bonan scion de Esperanto en nuraj kelkaj monatoj, oni povus organizi du sinsekvajn kursojn por komencantoj en la sama jaro. Intensa informado antaŭ la kursoj — ekzemple per afiŝoj, flugfolioj, artikoloj aŭ informoj en la loka gazetaro, prelegoj, ekspozicioj k.s. laŭ la lokaj cirkonstancoj — kun precizaj indikoj pri la kursoj mem, ne povas ne altiri sufiĉe da interesigantoj. Se la kursanoj havas malsaman edukitecon — ekzemple unuj finis mezgradan lernejon aŭ eĉ universitaton, dum aliaj havas nur elementan klerecon — plej oportune estas formi du aŭ plurajn klasojn. Tio ne estas diskriminacio, sed tute simple necesa rimedo por sukcesigi la kurson. Sendube personoj, kiuj lernis aŭ eĉ scias plurajn fremdajn lingvojn, multe pli facile kaj pli rapide progresos en la lernado de Esperanto, ol kursanoj parolantaj nur sian propran gepatran lingvon. Komuna kurso devigus progresi aŭ tro rapide por unuj aŭ tro malrapide por la aliaj. Plue, estas gravege, vere gravege, atenti al la kvalitoj kaj kvalifikoj de la kursgvidanto. Ne ĉiu povas gvidi kurson de la Internacia Lingvo, eĉ ne ĉiu, kiu mem perfekte parolas ĝin. Ankaŭ ne ĉiu metodo estas same bona por ĉiuj kursoj. Se rekta metodo, sen eksplikoj de la gramatiko, povas esti bona en kurso de personoj, kiuj havas malmultan aŭ nenian scion pri la gramatiko de sia propra nacia lingvo, tia metodo, aplikita en kurso de Esperanto al studentoj, precipe konantoj de pluraj lingvoj, estas netaŭga kaj povas facile forigi la kursanojn unu post la alia.

Apartaj kursoj kaj studogrupoj devus esti organizitaj por la progresintoj kaj por la membroj, kiuj deziras pritrakti specialajn

²⁾ Publikigita en la broŝuro "Statuto kaj regularo", ricevebla de la C.O. de UEA.

problemojn aŭ demandojn. Se la loka grupo havas sian propran ejon, ne estas malfacile aranĝi apartajn semajnajn kunvenojn por tiaj celoj. Tamen, ankaŭ societoj sen propraj ejoj povas per iom da bona volo organizi malgrandajn studogrupojn, kies kunvenoj povas okazi en privataj hejmoj aŭ en alia konvena loko.

La lokaj societoj devus esplori la eblecojn organizi kursojn ankaŭ ekster la kadro de la societo, ekzemple en la lernejoj, per la loka radio, en iu loka gazeto, en kulturaj societoj, sindikatoj, diversaj kluboj, depende de la cirkonstancoj. Unuopaj membroj povus instrui siajn geamikojn kaj gekonatojn.

Fine, la tuta interna vivo de la loka grupo, se ĝi volas prave porti la nomon de Esperanto-societo, estas konstanta kaj plej efika lernejo de la lingvo. La Internacia Lingvo fariĝis vivanta instrumento de vivanta kolektivo nur tial, ĉar ĝi estis kaj estas ne nur uzata skribe, sed ankaŭ flue parolata. Ju pli la lokaj grupoj praktikas la lingvon en ĉiuj aspektoj de la societa vivo, des pli vivanta estas la lingvo. La tasko de la loka grupo estas altigi la lingvan nivelon de la komencantoj kaj progresintoj al tiu de la plej bonaj uzantoj de la lingvo, kaj ne, inverse, transformi la societon en kurson por komencantoj de la unua leciono aŭ, eĉ pli malbone, en sterilan grupeton, kiu multe parolos pri la "Granda Ideo", sed kies membroj tamen ne kapablas esprimi sin flue kaj korekte en la lingvo. La novaj esperantistoj devas trovi en la loka grupo la medion, en kiu la lingvo vivas en sia plena forto kaj kie, tial, ili povos aŭskultante kaj mem parolante perfektigi sian propran lingvoscion.

Interna Vivo

Laŭ la statistiko, farita de CED en 1964, en 37 landoj entute ekzistas minimume 1242 lokaj Esperanto-societoj kun preskaŭ 40.000 membroj.³⁾ El ili verŝajne troviĝas eĉ ne unu, kiu ne organizas regulajn kunvenojn. La demando estas kiom oftaj estas tiuj kunvenoj kaj kian programon la loka grupo prezentas al sia membraro.

Rilate la oftecon, ĉiu loka grupo devus klopodi organizi regulan kunvenon ĉiun semajnon. La programo devus esti bone pripensita kaj la partoprenantoj devus konsciencie prepari sin. Se oni agas tiel, la membraro mem volonte ĉeestos la kunvenon, havos plezuron, akiros novan scion, kontenta revenos hejmen kaj antaŭĝojos pri la sekvanta kunveno. Male, se la programo estas mallerte improvizita, la preleganto ne scias sian propran temon, sensukcese serĉas ian penson, aŭ se la aliaj eroj de la programo estas simile nepreparitaj, la membraro iom post iom forfalos, novaj membroj ne aliĝos, restos do nur la plej obstinaj "fideluloj" pro la nura fideleco al sia idealo, kio povas esti bela kaj laŭdinda, sed kio neniel

helpos al la loka grupo plenumi la funkcion de la portanto de Esperantismo en la urbo aŭ distrikto.

Bona loka grupo povas hodiaŭ facile plenigi per vere interesa enhavo la programon de la semajna kunveno. Prelegoj de kompetentaj membroj, interŝanĝado de prelegoj aŭ programoj kun eksterlandaj grupoj utiligante tiucele ankaŭ la magnetofonan servon de UEA, aŭ pretigante mem specialan bendon, literaturaj vesperoj kun enkonduka prelegeto, legado aŭ deklamado de selektitaj tradukoj kaj taŭgaj komentoj, folkloraj vesperoj dediĉitaj al aliaj popoloj, programoj konforme al la kunlaborado de UEA kun Unesko, precipe rilate al la projekto Oriento-Okcidento, muzikaj vesperoj kun koncizaj komentoj, vivaj gazetoj — ĉio ĉi prezentas interesan materialon por la regulaj kunvenoj. La pli fortaj societoj povus ankaŭ organizi amatoran teatran trupezon aŭ kanĥoron, dancvesperojn, publikajn festajn aranĝojn k.s. Okaze de grandaj kampanjoj, ekzemple en 1965 okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro, la lokaj grupoj povus kaj devus doni sian plenan apogon konforme al la agadplanoj por tiuj specialoj celoj. Tio ne nur helpus la sukcesigon de la koncerna kampanjo, sed ankaŭ kontribuos al plia vigligo de la vivo en la loka grupo.

★

Kompreneble, ĉiuj ĉi agadoj estas firme kunligitaj unu al la alia. Nenia alvoko al la malnova membraro realiĝi al la grupo havos efikon, se la grupo ne aktiviĝas en ĉiuj direktoj. Vane oni malfermas kursojn, se antaŭ tio oni ne informas kiel eble plej vaste. Kaj eĉ la plej bona informado restos sen rezultoj, se oni ne ekspluatas ĝin por malfermi novajn kursojn kaj por instrui la lingvon ankaŭ alimaniere. Malmultan utilon havas la ĝenerala movado de informado, eĉ de la plej trafa, kaj de sukcesaj kursoj, se la interna vivo de la lokaj grupoj lamas.

Nur forta organizo kune kun paralela kaj samtempa atentado al la tri ĉefaj aspektoj de la agado, kaj al la tuto de la unuopaj eroj interne de ĉiu el ili, garantias tutcertan sukceson. La brilaj ekzemploj de niaj plej elstaraj lokaj grupoj en diversaj landoj pruvas, ke neniaj eksteraj cirkonstancoj, nek eventualaj malsamecoj de la kondiĉoj — kun la escepto de rekta politika premo — povas malbligi tion. La estonteco de la lokaj Esperanto-societoj, kaj sekve de la plua pli aŭ malpli rapida progresado de la ĝenerala Esperanto-Movado, troviĝas se ne plene, do certe unuavice en iliaj manoj, resp. en la manoj de iliaj funkciuloj. En tiu ĉi Jaro de Internacia Kunlaboro, kiun UEA siavice proklamis Jaro de la Internacia Lingvo, la lokaj Esperanto-societoj streĉu ĝis maksimumo siajn fortojn por alporti kiel eble plej grandan kontribuon kaj al internacia kunlaborado kaj al plua disvastigo de la Internacia Lingvo.

Ivo Lapenna

³⁾ Konciza resume en "Esperanto", januaro 1965, p. 10. Kompleta adresaro aperos en 1965.

Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado

Stato je la 20-a de januaro

Ĝis la 20-a de januaro la Centra Oficejo en Rotterdam ricevis entute 1239 subskribo-foliojn, kun 25 392 individuaj subskriboj el 33 landoj, kaj subskribojn de la oficuloj de 138 organizaĵoj en 18 landoj kun 1 155 509 membroj. Krome, ĵus alvenis antaŭinformo pri subskribo de la "Dana organizaĵo de kunagantaj fakaj unuiĝoj", kun 825 000 membroj. Sekve oni jam povas kalkuli pri preskaŭ 2 milionoj da membroj de subskribintaj organizaĵoj.

Kvankam la alvenado de subskribo-folioj iom plirapidiĝis, estas tamen evidente, ke ankoraŭ tre multaj kolektantoj prokrastas alsendon de plenigitaj folioj. Ni refoje insiste petas, ke oni kiel eble plej ofte sendadu al la Centra Oficejo, ĉu rekte, ĉu pere de la landa asocio aŭ alia peranto, la plenigitajn foliojn. Alie estas grava risko, ke la amasa alveno de plenaj folioj en la fino de la kampanja periodo (septembro-oktobro, do ĝuste kiam amasiĝas aliaj laboroj pro la kongresa kaj feria sezono en Eŭropo) kaŭzos grandajn malfacilaĵojn por la statistikado.

Novaj gravaj subskriboj

Krom la supre menciita dana organizaĵo subskribis granda germana sindikato, la "Industria Sindikato Konstruaĵoj-ŝtonoj-teroj", en kiu membras 487 803 membroj. Malpli impona, sed ankaŭ signifa sukceso estas la subskribo de la jugoslavia landa sekcio de ISMUN, la internacia studenta movado por Unuiĝintaj Nacioj.

Aparte nombrataj en la C.O. estas subskriboj de urbestroj: ĝis nun 9, el kiuj la plej lasta estas la urbestro de Nürnberg (vidu foton), kiu donis sian subskribon en ĉeesto de ĵurnalistoj k.a. El Vjetnamio subskribis la ambasadoro en Moskvo, s-ro Nguyễn van Kinh; en Koreujo jam la vicprezidanto de la parlamento, generalo Chang, 2 eksministroj kaj 3 parlamentanoj donis siajn subskribojn. Aliaj parlamentanoj subskribis en Svedujo, Nederlando, Britujo kaj Belgujo. En Svedujo estas menciinda ankaŭ la episkopo Sven Danell en Skara.

UZU LA JIK-GLUMARKOJN !




Bela marko kun nigra surpriso sur verda kaj blua desegnaĵo. Aldonu ĝin al ĉiuj viaj korespondaĵoj en la Jaro de Internacia Kunlaboro !

Prezo: 0,40 gld. (1 rpk.) por unu folio (10 markoj)

Kiu havas la rekordon ?

Laŭ niaj plej lastaj informoj la rekordo por kolektado de individuaj subskriboj apartenas nun al s-ro Reinhard Haupenthal en Germanujo, membro de Germana Esperanto-Junularo. Li ĝis nun akiris 700 subskribojn. "Ĝenerale" li skribas "ni eluzas ĉiun ajn okazon sin prezentantan. Unue ĉe familianoj (en la plej vasta senco de la vorto), ĉe konatoj, ĉe labor-kolegoj. Meze de oktobro ni havis E-ekspozicion en Saarbrücken... kaj tie kolumkaptis multajn homojn. Mi cirkuligis la listojn en nia urba domo (subskribis ankaŭ nia urbestro d-ro Müller), ni iris al la urbaj lernejoj, al pastroj ktp senfine..." Kion unu tiel atingis, tion aliaj almenaŭ provu atingi ! Nun jam preskaŭ ĉiu ekzistanta landa asocio disponas pri kvanto da subskribo-folioj kun nacilingva teksto, kaj ĉiu povas ricevi per nura alskribo. Ĝis nun pli ol 150 000 folioj estas ekspeditaj el la C.O. Plej laste estas aranĝata surpriso de teksto en la korea lingvo.



Diskonigo de la kampanjo

Multaj ĵurnaloj en diversaj landoj, precipe en Belgujo kaj Germanujo, jam publikigis almenaŭ la tekston de la Propono. Tamen necesus dediĉi pli da atento al tia informado en la informaj fakoj, ĉar la afero prezentas vere oportunan okazon por proponi pli ampleksajn materialojn — artikolojn, novaĵojn, ktp. — pri la Internacia Lingvo. En kelkaj landoj estas ankaŭ komencitaj kontaktoj kun la landaj komitatoj por JIK: en Nov-Zelando, ekzemple, la prezidanto de NZEA, prof. Adcock, povis prezenti la demandon de internacia lingvo por internacia kunlaboro al reprezentantoj de ĉ. 100 organizaĵoj kunvenintaj por plani pri agado dum la JIK.



la jaro de internacia kunlaboro, jaro de la int. lingvo esperanto

La urbestro de Nürnberg, Germanujo, subskribas la Proponon al UN; maldekstre la prezidanto de UEA.

esperanto
februaro 1965



Rev. F. Moravec

Normalaĵo ĉe nia lingvo estas, ke la esperantistoj ne lernas ĝin normale, sed nur en la stato de multjarulo, aŭ nur kelkfoje aŭ malofte kiel juna homo, sed preskaŭ neniam kiel infano. Tio ĉi lasta estus la normala kazo por ĉiu ano de ia alia lingvo, sed ĉe esperantisto tiel ne estas. Oni ne rajtas riproĉi la esperantistojn pro tio, ke ili ne lernis la lingvon dum junaĝo. Ni devas eĉ ĝoji pri tio, ke ili almenaŭ kiel plenkreskuloj estis atentigitaj pri Esperanto kaj eklernis aŭ ellernis ĝin. Ĉar nia lingvo ankoraŭ ne havas longan ekzistadon kompare kun naciaj lingvoj (— kvankam ankaŭ kelkaj naciaj lingvoj havas ankoraŭ ne tre longan vivon —), tial la instruado de la lingvo devis kaj devas okazi al plenkreskuloj, kiuj posedas jam multjaran ekzercon kaj sperton en alia, nacia lingvo.

Tamen tio validas nur ĝenerale. En kelkaj kazoj ni povas jam konstati, ke ekzistas homoj, kiuj ne alprenis nian lingvon en aĝo de junulo aŭ pli poste, sed jam en plej frua aĝo, kiel infano, kiel suĉinfano, do en tiu ĉi senco normale.

Tiuj denaskaj esperantistoj certe estas ia konkurenco por niaj veteranoj. Per tio neniel estu io dirita kontraŭ ili, kiuj havas plenajn meritojn pri tio, ke ili lernis la lingvon antaŭ multaj jaroj kaj restis fidelaj al la lingvo, al la movado. Ĉe niaj denaskaj esperantistoj oni ne plu povas paroli pri ia merito, esti 30 aŭ 40 aŭ 50 jarojn fidela al la hejma, de la patro heredita lingvo.

Ĉe tiu konstato de ekzisto de nova speco de esperantistoj estiĝas du demandoj:

Ĉu tia agmaniero, transdoni Esperanton jam al infanoj, eĉ al suĉinfanoj, havas sencon, kaj due, se ĝi estas iel konsilinda, kiel oni tion faru.

Ofte ni povas aŭdi aŭ legi, ke Esperanto estu ĉies dua lingvo. Ke homo scipovu paroli du lingvojn, estas ankaŭ celo de la dulingvismuloj.

LA HEJMA UZADO

En nacilingvaj rondoj oni povas de tempo al tempo aŭdi proponojn, ke, laŭ la regionoj, ĉiu sciu krom la gepatra lingvo ankaŭ la anglan, aŭ la francan, aŭ la ĉinan, aŭ la rusan. Tiuj sinceraj proponoj nun jam enhavas la rekomendon aŭ postulon, ke oni komencu laŭeble plej frue, laŭeble jam hejme ĉe la infanoj. Sekvante tiujn ideojn, ni venas al la konkludo, ke la dua lingvo laŭ raciaj pripensoj estu Esperanto kaj ke ĝi estu uzata jam plej frue.

Krom tiu ĝenerala kaj populara celo ekzistas klopodoj, ke oni parolu nian lingvon laŭeble plej bone, plej flue, en la sama kvalito kiel la nacia lingvon. Ankaŭ ĉi tie validas: ju pli frue ni komencas, des pli bone ni regas la lingvon. Ne nur la uzanto de la lingvo profitas per longjara parolado, sed ankaŭ la lingvo mem, la ilo, akiras avantaĝojn, ĉar uzata parolata lingvo estas pli perfekta, pli glata, pli utila ol lingvo malofte uzata, preskaŭ ne uzata aŭ eble nur skribita aŭ presita.

Kompreneble la lingva kvalito dependas de la transdonantoj de la lingvo. La Lingva nivelo de la gepatroj speguliĝas en la nivelo de la infano kaj junulo. Sed tio ĉio estas tutsama kiel en naciaj lingvoj. Esperanto ne prezentas ĉi-kaze ion novan.

Tiuj pripensoj igas rekomendi la transdonon aŭ heredigon de la lingvo jam en tempo pli frua ol en tiu de la lerneja vizito, nome jam en la hejmo, ek de la naskiĝo, pere de la gepatroj aŭ pere de unu el ili.

Speciala esperanta lingvosento

Tiu natura plua evoluo de nia lingvo ankaŭ estu alcelata, ĉar lingvo nur studita el libro ne povas esti vivanta lingvo. Esperanto ja estas por la interkompreniĝo inter homoj ĉiaspecaj, pro ĉiaj intereso, kaj tiun taskon povan plenumi nur vivanta, bone parolata, eĉ hejme uzata lingvo. Tiu natura vojo de hereda transdono de la lingvo kondukas al la kreo de speciala esperanta lingvosento. La ekzisto de propra lingvosento estas grava por la lingvo. La pioniroj kaj veteranoj eliris de la jam sciata nacia gepatra lingvo. Tial ili prijuĝas esperantajn lingvajn demandojn laŭ la jam dum 30-40 jaroj kreita forta lingvosento de tiu nacia lingvo kaj tiu nacilingva lingvosento superas ĉie en lingvaj demandoj, ankaŭ en demandoj pri Esperanto. Sed ĉe homo, kiu aliras Esperanton denaske, sen la malhelpo flanke de nacilingva lingvosento, kreskas speciala lingvosento por Esperanto. Denaskaj esperantistoj havas alian opinion pri la malvortoj, pri „necesaj” neologismoj, pri lingvaj demandoj, ol tiuj pli aĝaj „normalaj” esperantistoj.

La plej ĝenerala celo de la esperantistoj verŝajne estas ĝia agnosko kiel internacia lingvo. Pri tiu politika celo jam Zamenhof diris, ke ekzistas du vojoj de celatingo, tiu per la

amasmovado de la popoloj, de la multegiĝintaj esperantistoj, aŭ tiu per la registaroj, alivorte pere de la politikistoj kaj sciencistoj.

Hodiaŭ preskaŭ neniu plu opinias, ke la vojo de la amasmovado estos venkondona aŭ eĉ bonŝanca. Ĝenerala konvinko estas, ke la vojo trans la registaroj, do unue trans la sciencistoj kaj due per ili trans la politikistoj, estas irenda. Ĉiukaze tio signifas, ke — kvankam tie-tie estas progresoj — la venko ankoraŭ bezonos sian tempon kaj ni bezonas paciencon, alivorte: ni esperantistoj devas vivteni nian lingvon, por ke ĝi plu ekzistu kiel vivanta lingvo, ĝis finfine Esperanto estos agnoskita kiel oficiala internacia lingvo.

La tasko vivteni la lingvon povas plenumiĝi sur du kampoj. La kluboj kaj ilia organizo, la asocioj havas tiun taskon, kaj la hejmo de la esperantistoj estas la dua kampo. Ĝi ankoraŭ ne estas tiel disvastiĝinta kiel la bone ekzistanta kaj funkcia grupa vivo. Tio do ankaŭ estas la signifo de la uzado de la lingvo hejme, ke ĝi helpas al la aktivado de la kluboj, ke la lingvo ne mortu, antaŭ ol la celo estas atingita. Ĉiu el ambaŭ vojoj havas siajn eblojn, siajn avantaĝojn. Sed lingvo, kiun la patro transdonas kiel vivantan, uzatan, parolatan, kiun la filo transprenas kiel heredan, kiun oni hejme uzis, parolis, certe ne formortos.

Ke la lingvo malofte ankaŭ estas uzata kiel sekreta lingvo, por ke la najbaroj aŭ, ĉeokaze, fremdaj homoj ne komprenu la paroladon inter gepatroj kaj gefiloj, estas fakto ankaŭ helpa, kvankam ĝi estas iom paradoksa.

La fojaj malsukcesoj kaj ankaŭ la nescio pri la afero ĉe novuloj estigas la duan demandon: kiamaniere oni praktiku la hejman uzadon de nia lingvo.

Praktikaj konsideroj

Antaŭ ĉio, kvankam ankaŭ iom paradokse, tamen laŭ multaj observoj kaj spertoj, la sinteno de la patro devas esti tolerema, tio signifas, ke li devas agnoski la saman rajton al ĉiu lingvo. Li devas toleri la paroladon de la nacia lingvo hejme. Tio aliflanke donas al li la rajton uzi siaflanke Esperanton. Tiamaniere li ne vekas kontraŭstaron, sed lasas ĉiun paroli laŭ sia prefero. Ŝildetoj kiel "tie ĉi nur Esperanto estu parolata" estas senefikaj, eĉ kontraŭefikaj.

Li simple uzu Esperanton, parolu ĝin!

Ĉiu patrino estu modelo por li! Kvankam la suĉinfano ankoraŭ ne respondas aŭ parolas, ankoraŭ eĉ ne komprenas, la patrino daŭrigas la alparoladon en la koncerna lingvo kaj tiamaniere la infano lernas la gepatran lingvon. Tutsame enkondukiĝas Esperanto en la familion. Sole la forto kaj la pacienco de la patro (aŭ de la patrino) decidas. Popoloj per tiu forto konservis sian hejman lingvon eĉ sub malagrablaj cirkonstancoj. Ĉu esperantistoj ne havas ankaŭ tiun forton kaj persiston?

Certe ekzistas malhelpoj. La najbaroj nun ankoraŭ ne parolas Esperanton, la parencoj ankaŭ ne, la butikisto, la leterportisto, la infanoj sur la strato, ili ĉiuj ne parolas la lingvon de la patro.

Tamen infanoj povas facile lerni du lingvojn. La celo ne estas anstataŭigi la nacian lingvon per Esperanto aŭ forigi la nacian lingvon, sed lernigi la duan lingvon Esperanto. La tasko de la patro estas krei tian ĉirkaŭon por la infano en la hejmo, ke ankaŭ la dua lingvo Esperanto havu hejman rajton kaj estu uzata same kiel la nacia lingvo.

Alia konsilo estas, ke la patro neniam instru laŭ instrulibro, gramatiko aŭ vortaro. Tiamaniere foriĝus ĉiu ŝanco je sukceso. Nur la natura normala uzado de la lingvo instigas al la parolado de la lingvo flanke de la infano. Neniam li postulu tradukadon, almenaŭ ne en la komenco, sed li pruvu, ke Esperanto estas sambona kiel ia nacia lingvo, kiun oni ja ankaŭ ne tradukas hejme.

Tiu kresko de Esperanto ĉe la denaskaj esperantistoj kaj la evoluo de la esperanta lingvosento estas aferoj, kiuj valoras la penon de scienca observado. Por ĝuste konkludi, necesas ĝusta kaj ampleksa observado. La ebloj de tia observado nur estas maloftaj. Tiom da esperantistoj, kiuj ĵus povas bonvenigi novnaskitan infanon ĉe si, ne ekzistas en nia movado. Tial estas bone, ke estu atentigate plej vaste pri tiuj ebloj de uzado de Esperanto kaj pri la neceso ankaŭ de ĝia observado. Por povi kompari la diversajn observojn, necesas uzi laŭeble la samajn formojn de la observado resp. la samajn formojn de la notado. La iama revuo "Bulteno Gepatra" jam enhavis listojn pri la vortprovizoj de denaskaj esperantistoj. Rekomendiĝis jena sistemo de vort-(vorter- aŭ frazer-)notado:

- 1-e de la infano aŭdataj kaj komprenataj vortoj, sed ne parolataj,
- 2-e de la infano parolataj kaj komprenataj vortoj,
- 3-e de la infano parolataj vortoj, sed ne komprenataj.

Rekomendiĝas en ĉiu grupo dispartigi la vortojn aŭ vorterojn laŭ la signifo: personoj, bestoj, manĝo, farto, objektoj, agoj ktp. Eble troviĝas institucio, redakcio de revuo, rondo de interesuloj, kiu kolektos la materialon kaj pretigos ĝin, por ke la publiko kaj novaj gepatroj trovu ĝin atingebla kaj pretigita.

Tamen, eĉ sen tia scienca esplorado estas grave, ke nia lingvo estu uzata ankaŭ hejme. Ĉiuj artikoloj kaj eseoj restas senvaloraj, se la lingvo ne estas uzata, parolata en ĉiuj medioj, ankaŭ hejme. Evoluo kaj progreso sur tiu ĉi kampo estas jam konstatebla. Antaŭ 20 jaroj oni preskaŭ nenion povis legi aŭ aŭdi pri tiu demando, krom esceptaj raportoj de pioniroj ekz. de la angla M. C. Butler. Hodiaŭ en multaj revuoj oni jam tuŝas la problemon kaj diskutas ĝin. La hodiaŭa tasko estas almenaŭ, atentigi pri ĝi kaj plej vaste instigi, ke ĝi estu neneglektata.


NIKKO, JAPANUJO

Yukiko Isobe
membro de LKK,
50a UK, Tokio

Inter multaj vidindaj lokoj en Japanujo, Nikko estas unu el la plej popularaj lokoj vizitataj de ne nur japanoj sed ankaŭ multaj alilandaj turistoj.

Nikko, situanta ĉirkaŭ 90 mejlojn for nord-oriente de Tokio, estas facile atingebla en malpli ol du horoj per Japana Nacia Fervojo aŭ Tobu-Linio de Tokio. La kombino de la arkitektura beleco de Toŝogu-Sanktejo kaj natura beleco de la monta regiono, kiu inkluzivas Kego-Akvofalon, Lago Ĉuzenĵi kaj aliajn, allogas milionojn da vizitantoj tra la jaro.

Toŝogu-Sanktejo staras ne tre malproksime de la stacio de Nikko: nur en la distanco de kelkminuta veturo de aŭtomobilo. Ĉi tiu sanktejo estas dediĉita al Iejasu Tokugaŭa kaj aliaj du herooj, Joritomo Minamoto, lia prapatro, kaj Hidejoŝi Tojotomi, lia antaŭulo. Sed ĝi estas konata pli bone kiel la tombejo de Iejasu Tokugaŭa, fondinto de la Tokugaŭa-Soguna reĝimo.



Kiam li mortis en 1616, li estis provizore enterigita ĉe Kunoŝan apud la urbo Sizuoka, sed laŭ lia testamento, lia korpo estis transportita al Nikko por eterna entombigo.

En la sama jaro li estis diigita laŭ la Sintoisma tradicio diigi heroojn, kaj la titolo Toŝo Daigongen (Oriento-Lumiganta Enkorpiĝo de Bodisatvo) estis donita de la imperiestro. Tio estis la origino de Toŝogu-Sanktejo. Poste en novembro de 1634, lia nepo, Iemicu komen-
cis konstrui ĉefajn konstruaĵojn de la sanktejo.

Tiam plej elstaraj artistoj kaj lertaj metiistoj estis alvokitaj al Nikko el la tuta lando: precipe multaj venis el Kioto. En la kredindaj dokumentoj estas skribite, ke la totala nombro de la laborantoj estis ĉirkaŭ 4 541 230. Ili kompletigis seriojn da riĉe ornamitaj pompaj konstruaĵoj, nome, ĉefa preĝhalo, apudaj sub-
haloj, pordegoj, tenejoj, tamburo- kaj sono-
riloturoj kaj ceteraj ĝis aprilo, 1636.

Inter tiuj konstruaĵoj plej fame konata estas Jomeimon, pordego al la ĉefa preĝhalo. Oni diras, ke ĝi estas la plej bela pordego en Japanujo, kaj alinomata "Higuraŝi-no-mon", tio signifas: la pordego, kiun oni ravite rigardadas ĝis vesperiĝo.

La tereno de la sanktejo situas sur la deklivo de la monteto kun multaj japanaj cedroj plantitaj ĉirkaŭ 300 jarojn antaŭe, kiam la sanktejo estis konstruita. Tiuj ĉiamverdaj grandaj arboj kaj pompaj konstruaĵoj prezentas belan kontraston sub la blua ĉielo.

Lago Ĉuzenĵi kuŝas 11 mejlojn for de la urba centro, je 4120 futoj supre de marnivelo, apud Monto Nantai, kiu iam estis aktiva vulkano. Dum ni veturas al la lago laŭlonge de la valo sur la zigzaga ŝoseo per aŭtomobilo aŭ buso, ni povas plenplene ĝui belajn pejzaĝojn grade variantajn laŭ alteco. Kaj ankaŭ laŭ la ŝanĝo de sezonoj ni vidas tute malsaman belecon de la monta regiono — en printempo kun ĉerizfloroj kaj azaleoj, en somero kun refreŝige verdaj foliaroj, en aŭtuno kun flame koloritaj foliaroj kaj en vintro kun blanka neĝo.

La akvo de la lago falas de la alta lafa krutaĵo kaj formas faman Kego-Akvofalon, kiu havas la altecon de ĉirkaŭ 320 futoj. Per lifto ni povas malsupreniri por rigardi la akvofalon de ĝia bazo.

Uzante kablovagonon ni povas atingi Akeĉidaira, observejon ĉe la pinto de la monto, de kie ni povas rigardi grandiozan panoramon de Kego-Akvofalo, Lago Ĉuzenĵi kaj la tuta ĉirkaŭaĵo. Se la vetero estas bela kaj klara, tiu vidaĵo certe restos ĉiam en nia memoro. (LKK aranĝos ekskurson al Nikko dum la Tokia UK).

Maldekstre: la akvofalo Kego, kiun formas la elfluo de lago Ĉuzenĵi. La altecon oni povas taksu per la grandeco de la homfiguroj ĉe ĝia bazo.

Dekstre: "la plej bela pordego en Japanujo", Jomeimon.



PACHINKO

(Fabelo, sed ne tro, de moderna tempo)

Mi havas rendezvuon kun la imperiestro je la 4-a posttagmeze. Nun estas la 2-a, restas du horoj.

La imperiestro indigis min, eksterlandanon, esti akceptita. Altranguloj kaj gravuloj revas vane pri tia privilegio dum la tuta vivo kaj maljunaj mortas kun la amara elreviĝo. Mi prezentis mian peton sen iu ajn espero, kiel aĉetante bileton de granda loterio. Tuj, mistere, mi ricevis jesan respondon.

Restas du horoj kaj mi sentas min nerva. Ne estas la nemezurebla honoro kiu min nervozigas aŭ timigas. Tiu ĉi renkonto signifas por mi multe pli, de ĝi dependas mia estonteco. Ĉar mi per mia voĉo petos ke la imperiestro lasu min reiri al mia patrujo, nur li povas permesi tion al mi. Surgenue mi diros via supera moŝto dia filo de la suno mi vin petegas donu la ordonon ke oni lasu min foriri kaj li apenaŭ palpebrumos, tremo trakuros la ĉeestantojn, tuj la sekretarioj ekagos, reveninte en la hotelon mi trovos jam la skribitan permeson kun la ora sigelo.

Mi surhavas malhelan kostumon, mi surmetis la plej bonan ĉemizon, mi rigardadas la horloĝon, verŝajne estas pli bone ke mi iomete promenu, la tago estas suna, kvankam mi havas eksterlandan vizaĝon la homoj sur la strato ne atentis min, sed se ili sciis ke post du horoj mi renkontiĝos kun la imperiestro....

Miaj nervoj estas streĉitaj, el la du horoj kiuj restis kvin minutoj jam pasis, sed restas ankoraŭ longega tempo. Promenante mi eniris en la Sinjuku-kvartalon, formikejo el deziroj, plezuroj kaj malvirtoj nekonataj en ĥaoso el butikoj, kafejoj, restoracioj, drinkejoj, kabaretoj malgrandaj eniĝintaj unu en aŭ sur la alia kaj plenplenaj de virinoj, sed nun ankoraŭ ne komenciĝis la febro. Sur malalta pavilono estas en latinaj literoj la surskribo *Pachinko*.

☆

Oni diras ke la *pachinko** estas utila por trankviligi kaj forigi la malbonajn pensojn. Eble tio estas bona por mi. Jam aliajn fojojn mi ludis je *pachinko* kaj mi havas naivan memoron. Oni malsupreniras kvin ŝtupojn, la virino ĉe la tablo havas vizaĝon triangulan kaj popolan, kiam mi donas al ŝi kvindek enojn ŝi manipulas aparaton kaj en ujon fluas mia porcio da metalaj pilketoj: dudek kvin.

En sep longaj mallargaj koridoroj paralelaj per neono lumigitaj, antaŭ centoj da maŝinoj centoj da junuloj kun glataj nigraj haroj staras senmovaj, nur la fingroj moviĝas mono-

tone aŭtomate. Sed estas ankaŭ kelkaj viroj pli aĝaj, ankaŭ tipoj seriozaj venintaj ŝerci kun la sorto.

En mia lando tiajn maŝinojn mi neniam vidis. Oni enigis en truon la sferetojn unu post la alia, la dekstra dikfingro movas levileton kaj trans la vitro oni vidas la sfereton kiu saltas supren laŭ la cirkla relo, la puŝo ne devas esti tro forta nek tro malforta, estas necese ke ĉe la supro la pilketo ne plu havu forton kaj refalu. Ĉi tie komenciĝas la hazardo.

Restas ankoraŭ unu horo kaj tri kvaronoj, iom da *pachinko* helpas, la imperiestro mem eble estus kontenta se li sciis ke mi ludas je *pachinko*, li pensus tiu eksterlandano bone faras distriĝante per la ludoj de mia popolo, tiel poste li prezentiĝos antaŭ mi kun serena vizaĝo. Ekzistas sep malgrandaj buŝoj en kiujn, malsuprenfalante, povas eniri la pilketo, kaj tiam oni gajnas. Sonorilo aŭdiĝas, ronda okulo lumiĝas en la mezo kaj gaje elrulas dekkvin pilketojn en la suban ujon. Kaj ĉar estas centoj kiuj samtempe ludas, estas daŭra sonorilado kaj falbruado sed super ĉio, en la frida triumfo de la neono, muziko martelas: kanzonoj kaj kanzonoj, senbremsaj voĉoj japanaj, de Ameriko, de Francujo, de Italujo, de Hispanujo, de Kubo, de Arabujo, Armstrong Kurt Weill Sinatra Modugno Aznavour Perez Prado estas freneziga ondo en kiu rapide la pensoj dronas.

Sed por atingi la sep buŝojn de la sorto la sfereto devas venki labirinton, tio estas arbaro el najletoj, kaj sur la najloj la brilanta pilketo freneziĝas, ĉi tien kaj tien saltas, serĉas la ĝustan vojon kaj poste revenas, novaj obstakloj ĝin devojigas, malsupren malsupren ĝis la fundo kie ne plu estas espero kaj la truo ĝin englutas. Tamen de tempo al tempo, malfacile estas klarigi kiel, la pilketo sukcesas, lumiĝas la ruĝa okulo, ekfunkcias la sonorilo, falas novaj kugloj en la korbeton.

☆

La dua kaj tri kvaronoj. Hodiaŭ mi ne estas bonŝanca, aŭ tiu ĉi maŝino estas tro malica aŭ mi ne donas la gustan puŝon al la pilketo. Unu post la alian miajn pilketojn englutas la *pachinko*, restas al mi nur sep, kiam ili estos elĉerpitaj mi foriros, mi fine ludas nur por pasigi la tempon, se mi gajnus mi ne ricevus milionojn, maksimume iom da ĉokolado, cigaredojn, biskvitojn. Kaj cetere de ĉi tie al la imperia palaco necesas minimume kvaronhoro, kaj estas bone troviĝi tie iom antaŭ la fiksita tempo.

Drrinn, la lumo ekbrilis, en la sama momento la gajnitaj pilketoj faladas. Sed tuj la okulo lumiĝas denove, ĉu eble la maŝino estas venkita? Jen ankoraŭfoje, la korbeto

* Elp. *paĉinko*. Aŭtomatigita formo de pingludo (vidu Terminaro de infanludoj).

Maŝinmondo de Sándor SZATHMÁRI. Eld. Stafeto, La Laguna, 1964. Beletraj kajeroj n-ro 22. 187 p. 18 × 12 cm. Kvar noveloj. Prezo: 5,70 gld. (22,8 st).*

La nova beletra kajero de Stafeto entenas kvar verkojn de la aŭtoro: *Maŝinmondo*, *Supermilaj noktoj*, *Dokumentoj pri la historio de la kompozono* kaj *Vincenzo*. Ne necesus diri, ke la reputacion de Sándor Szathmári establis lia majstra satiro *Vojaĝo al Kazohinio*, kiu, laŭ esprimo de Auld, jam indiĝeniĝis inter kulturitaj esperantistoj. Kalocsay skribis en sia antaŭparolo por *Kazohinio*: Fakte, la libro estigas en la leganto ion, kion oni povus nomi "stato post la ellego de *Kazohinio*". Ankaŭ tiu *Maŝinmondo*, kvankam ne tiel ampleksa, certe havas similan efekton por ĉiu pensema animo. Mi evitas doni resumon de la enhavo. Nur la konturon: dum ĉe *Kazohinio* nin obsedis la perfekte racia, kazoa vivo de la hinoj, ĉi-okaze la ĉefrolon ludas la maŝinoj ekstreme evoluintaj. Ĉi tie, antitezo por la homoj ne estas homoj alispecaj kiel la hinoj, sed estas la maŝinoj, la neorganikaj estaĵoj. Des pli drasta estas la efekto.

La verko prezentas al ni ja ne tre agrablan perspektivon pri la estonteco de *Homo Sapiens*. Kaj tamen, tiu perspektivo estas unu el eblaĵoj, kiel ajn malsimpatia ĝi estas. Neniu povus fornei ties eblecon. La celo de la verko ne estas simpla intelekta distraĵo, kiaj ofte estas t.n. sciencaj fikcioj. Ĉu la homaro povos teni homecon kontraŭ la senfine progresanta tekniko? Jen la ĝenerala problemo starigita

antaŭ ni, tute egale ĉu ni konsentas aŭ ne kun la pesimismo de la aŭtoro. Tiun problemon la aŭtoro elmetis, laŭ sia maniero kaj en la plej drasta formo.

Li faras ankoraŭ pluan paŝon, kiam li pene kondukas la leganton al la koncepto de mistera "ultrasubstanco". La argumentado pri ĝi estas ja kaprompa kaj tute fremda por adeptoj de la scienco en la 20-a jarcento. Ĉu tio ankoraŭ konsistigas ekstreman parton de

(daŭrigo sur p. 32)



Sándor Szathmári,
kies scienca fikcio
pri maŝino, kiu neni-
igas la homojn "pro
ilia propra intereso"
formas la kernon de la
novelaro
"Maŝinmondo"

(daŭrigo de la kontraŭa paĝo)

rapide estas preskaŭ plena.

La tria kaj dek. La ŝanco iras supren kaj malsupren, mi jam remalhavas preskaŭ ĉion, el la laŭtparoliloj aŭstra valso surdigas, nun necesas ke mi foriru.

Jes, mi devas foriri. Ofte trovi taksion ne estas tiel facile ĉi tie en Tokio. Sed jen la sonorilo, ekbrilas la kara ruĝa lumo, en du tri fojoj mi regajnas, mi sentas ke min io trenas. Ĉu estas la atmosfero el senmova freneziĝo kiu densiĝas en ĉi tiuj koridoroj? Ĉu estas la senesprima vizaĝo de ĉiuj ĉi junuloj viciĝintaj senfine unu ĉe la alia kiuj ne parolas ne ridas ne rigardas ne havas ian ajn esprimon? Ĉu estas la obsedo de tiuj ĉi sonoriloj, de tiuj ĉi faladoj, kiuj intermiksiĝas kiel senordaj ondoj? Ĉu estas la sovaĝa forto de la muziko? Ĉu estas la ekzisto, ekstere, de mondo senlima kaj nekomprenebla? La okulo palpebrume lumiĝis kvar fojojn, mi nun plusgajnas, la korbeto estas plenplena.

Kio nun okazas al mi? Je nekredebla rapideco la riĉa rezervo maldikiĝas, la *pachinko* ribelas al mi. Pli bone. Elĉerpinte la pilketojn mi foriros, nun ne plu restas al mi tempo.

Rapidu, rapidu, ankoraŭ tri, ankoraŭ du

pilketoj. Estas la tria kaj kvardek. La lasta pilketo. Adiaŭ *pachinko*.

La lasta pilketo startas, sen interesiĝo refalas, sen espero saltas de unu najlo al la alia, mi rezignas ĝin sekvi ĝis la fundo: ĉiukaze mi malgajnis. Mi paŝetas flanken por foriri, malgluiĝi de tiu ĉi dubinda objekto.

Diablon, la sonorilo, la lumo, la tintado de la pilketoj. Mi gajnis. Kaj la muziko saltas sur la tuton, nun estiĝas kermeso, la atmosfero ĉiam pli kaj pli streĉiĝas, mi nenion plu memoras, mi ne plu memoras mian nomon, mi de ĉiam estas ĉi tie, mia urbo miaj parencoj mia laboro miaj montoj ne ekzistas, mia lando neniam ekzistis.

La kvara. La kvara kaj unu minuto. Mía korbeto denove estas plena. Mi gajnos dek pakaĵojn da cigaredoj kaj skatolon da marmelado. En la interno de mia kapo estas deliro, bruego de cent akvofaloj. Mi ne plu revidos mian landon, mi neniam plu povos tien reveni. Perdita mi estas. Kaj strange feliĉa. En la tronsalono la unua ĉambelano kontrolis la horloĝon, klinetis la kapon: la eksterlandano ne plu venos. La imperiestro, senmova sub la baldakeno, vidis. La reĝaj lipoj montras melankolian kaj timigan rideton.

G. G. P.

esperanto
februaro 1965

lia amara mondrigardo, aŭ en tio li volas vidi ian lumpunkton, kiu briletas, de fore, de tre malproksime, tra la obskura tunelo de mal-espero? La respondo mi ne povis trovi.

El la aliaj tri pecoj apartan mension bezonas la lasta, en kiu la aŭtoro disvolvis interesan historion pri la astronomo Galileo Galilei. La originalo estis verkita en la hungara lingvo, kaj la esperantan tradukon donis Kalocsay. Mi citu vortojn de la aŭtoro: mi devas danki al Kalocsay... la brilan tradukon de la rakonto *Vincenzo*, per kiu li montris al mi la vojon, kiel mi devus verki, se mi estus ne nur verkisto, sed ankaŭ majstro de nia lingvo.

Konisi Gaku (Japanujo)



"Aŭskultu pacience, prinĉino," respondis Nanhinŝa. "Kiam mi alportis la sanktan akvon, survoje mi renkontis junulon. La demando min: 'Por kio mi ĝin prenas?' Poste li instruis al mi, kie oni verŝu la akvon sur banaton.' Nannona estis tiom ĝojigita kion mirigita. 'Ĉu mia amato vere alvenis? Sed kiamaniere -- ĉu flugi aŭ ĉevalo?'"

Specimena paĝo el

"Gaŭŝutun kaj Nannona"

Nos premiers pas en Espéranto (niaj unuaj paŝoj en Eo) de A. RIBOT. Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande, 1964. 36 p. 17 × 11 cm., plus nerompebla disketo 45 t.m. 1,50 gld.*

La originaleco de tiu ĉi inico-libreto kuŝas en la metodo uzata. Plaĉa historieto estas rakontata per 34 frazoj, en kiuj la ĉefaj punktoj de la Esperanta gramatiko estas lerte kaj grade dispartigitaj. Ĉiun frazon sekvas nacilingve kelklinia trafa komentario, foje apogita per tre sugestiaj ilustraĵoj, kaj traduko de la teksto. La gramofondisko reproduktas la historion laŭ ritmo iom tro rapida.

Pierre Royer (Francujo)

Bestkalendaro 1965. Eld. Reinsteg-Verlag, 7261 Gechingen über Calw, Germanujo. 12 p. 42 × 30 cm., kun kolorpresitaj pentraĵoj, kaj tekstoj germana kaj esperanta. Antaŭmendebla por 1966 ĉe la eldonisto. Prezo ĉ. 13 steloj.

Tiu ĉi grandformata kalendaro aperas jam la duan jaron kun ampleksaj tekstoj en Esperanto. La priskriboj estas aparte interesaj por ornitologoj, zoologoj kaj aliaj bestamantoj.

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Kalevala, finna nacia eposo, verse tr. J. E. LEPPÄKOSKI. Eld. Fondumo Esperanto, Helsinki, 1964. Serio Oriento-Okcidento n-ro 4. 368 p. 21 × 15 cm., ilustrita. Tolbind. 25,— gld. (100 st); kun leda dorso 35,— gld. (140 st).*

Gramofondisko: kantoj de BARTÓK, LISZT, MENIL ("La Espero"), marŝo de BERLIOZ. Eld. Qualiton, Budapest, 1962. Diam. 17 cm., 45 t.m. Prezo: 6,— gld. (24 st).*

La libro de la mediumoj, de Allan KARDEC, el la franca tr. L. C. Porto Carreiro NETO kaj Ismael Gomes BRAGA. Eld. Brazila Spiritisma Fed., Rio de Janeiro 1964. 430 p. 18 × 14 cm.

Hamburg. Eld. Fremdenverkehrs- und Kongresszentrale e.V., Hamburg 1, Bieberhaus, Germanujo. Nova eldono de kolora turisma broŝuro en pola, ĉeĥa kaj esperanta lingvoj.

SAT-Jarlibro 1964-1965. Eld. SAT, Parizo, 1964. 140 p., 15 × 10 cm.

Kara esperantisto. Eld. Erste Österreichische Spar-casse (Unua aŭstra ŝparkaso), Wien I, Graben 21. Prospekto.

Sellye. Eld. Megyei Idegenforgalmi Hivatal, Pécs, Széchényi tér 9, Hungarujo. Senpaga kolora turisma broŝuro.

Hamleto, princo de Danujo, de William SHAKESPEARE. Tr. L. N. M. NEWELL. Eld. Stafeto, La Laguna 1964. 251 p. 22 × 16 cm. Prezo: 9,10 gld. (36,4 st).*

Laborplano por verkado de memstara esperanta fakvortaro. Eld. Terminologia Centro de ISAE, s-ro R. Haferkorn, 824 Berchtesgaden-Gern, Am Etzerschlössl 15, Germanujo. 17 p. 30 × 21 cm., multobligita.

Kaŭzoj de milito, referato de J. W. NOBEL. Eld. FLE, Nepveustr. 33 II, Amsterdam W. 8 p. 24 × 16 cm.

Primer manual de la llengua auxiliar internacional Esperanto. (Unua lernilo). Eld. Caracas, 1960. 28 p. 16 × 12 cm. 0,90 gld. (3,6 st). Katalunlingva lernilo.*

El Afriko. Serio "Legu kaj lernu" n-ro 1. Eld. Faux, Britujo, 1964. 24 p. 17 × 11 cm., ilustrita, multobligita. 0,75 gld. (3 st).*

La floro en la loĝejo. Eld. Glassexport, Praha — Liberec, Ĉeĥoslovakujo. Kolora komerca faldfolio pri vitraj vazoj. Senpaga.

Harkány. Eld. Megyei Idegenforgalmi Hivatal, Pécs, Széchényi-tér 9, Hungarujo. Kolora senpaga turisma prospekto.

CITAĴOJ

F. Campus, rektoro de la Universitato de Liège, Belgujo: "La internaciaj rilatoj inter inĝenieroj estas nun tiel oftaj, ke la lingva demando baldaŭ ne plu estos problemo."

Paco, nov. 1964: "...tio estas la plej grava minaco al paco kaj sukereco de Japanio kaj tuta Azio." Maldolĉa afero...

La polvo de l' morto: "Por la landnomo ni uzis sufikson -uj-, por gardi unuecon de esperantistaro kontraŭ nukleaj armiloj."

LAŬLANDE

Aŭstrujo

● Lige kun la inaŭguro de la monumento pri Esperanto en Linz, okazonta tuj antaŭ la Eŭropa E-Konferenco en Vieno, estas aranĝata internacia renkontiĝo de la 9-a ĝis la 11-a de julio. Informas: s-ro J. Geroldinger, Marcusgang 7, Linz.

Bulgarujo

● Jam la duan fojon (unufoje por la UK en Sofio) aperis provnumero de grandformata kolorilustrita revuo "Bulgarino", eldonata de la Komitato de la Bulgaraj Virinoj, Bulv. Patriarh Evtimij 82, Sofio. Prezo neindikita.

Finnlando

● La 27-an de novembro reprezentantoj de la Esperanto-movado transdonis ekzempleron de la esperanta eldono de "Kalevala" al la prezidanto de la Respubliko, s-ro Urho Kekkonen. (Vidu bildon.)

Francujo

● En la tradicia Kultura Semajno en la "Kastelo de Grésillon", Baugé (Maine-et-Loire), okazonta sub aŭspicio de la eduka ministerio, de 9 ĝis 16 aprilo 1965, prelegos i.a. mag. S. Pragano, kaj s-ro M. Duc Goninaz. Krome estos videbla la filmo "Angoroj".

Israelo

● Dum en Tel Aviv komenciĝis pluraj lernejoj kursoj (ink. unu por instruistoj), en la teknika altlernejo de Haifa ĵus fondita studenta E-Komitato eldonis varbilojn en la hebrea, angla kaj franca.

Kongo

● En mezgrada lernejo de Léopoldville-Kalina okazis prelego de s-ro Edward Symoens kaj s-ro Louis Toko (prezidanto de Konga E-Instituto) pri "Esperanto je la servo de la homaro". Krom centoj da ĝelernantoj ĉeestis urbaj oficistoj pri instruado.

Koreujo

● Plue disvolviĝas la movado en la ĉefurbo Seulo. Nur dum novembro okazis en universitatoj kaj lernejoj 5 ekspozicioj kun entute 9000 vizitantoj. Dum la sama monato aperis artikoloj kaj raportoj en 6 gazetoj, interalie la Revuo de la Publika Informa Ministerio, kaj en radio. Okaze de la UN-tago, Korea E-Junularo okazigis seminarion kun prelegoj pri UN kaj Esperanto.

Norvegujo

● La programo de la Nordlanda Esperanto-Kongreso (junio 1965) anoncas festkunvenon en la aŭlo de la Universitato de Oslo, kun parolado de la prezidanto de UEA, prezento de elĉerpaĵo el Peer Gynt en Esperanto, kaj aliaj eroj. (Vidu "Esp." decembro, p. 218).

Pollando

● En Pedagogia Liceo en Vroclavo, unu el la "asociiĝintaj lernejoj de Unesko", la unuan fojon en Pollando tuta abiturienta klaso ricevos en majo 1965 instruistan diplomon kun poentoj pri Esperanto.

Unuiĝintaj Nacioj

● En duonmonata bulteno de la UN-sekretariato aperos artikolo pri la 10-jara kunlaboro inter UEA kaj Unesko, kaj alia pri poŝtmarkoj kun esperantlingvaj tekstoj.

Usono

● Katalogo de esperanta literaturo, preparita de Duncan Charters por la Esperanto Publishing Company of North America, estas distribuita al 2000 kolegiaj bibliotekoj tra Usono.

LAŬFAKE

Aŭtomobilistoj

● Bele prezentiĝas la nova "Aŭto-revuo" de la Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista. En 24-paĝa multobligita kajero kun presita kovrilo aperas temoj ĝenerale interesaj por aŭtistoj, krom la komencaj partoj de 6-lingva (esperanta, angla, franca, germana, itala, nederlanda) faka terminaro. La klubo jam akiris 150 membrojn, sed urĝe bezonas pliajn. Turnu vin al s-ro M. Jaumotte, De Bruynlaan 44, WILRIJK-Antwerpen, Belgujo.



Omaĝa prezento de "Kalevala" (vidu Finnlando)


Literaturo

● La "Vivo de Zamenhof" de Edmond Privat estas traduktita ne nur en la anglan, ĉinan, japanan, nederlandan, norvegan kaj polan, kiel ni skribis en "Esperanto" 1964, p. 174, kaj en la portugalan, kiel atentigis s-ino Privat en la decembra "Esperanto", sed ankaŭ (jam en 1932) eldonita en bulgara traduko de Dimitr Simeonov.

Turismo

● Utilan multobligitan liston de 55 komercaj kaj turismaj prospektoj senpage riceveblaj en Esperanto, kune kun la adresoj de la eldonintaj instancoj, produktis la Sveda E-ista Junulara Unuiĝo, Fack 101, Höör, Svedujo.

mallongaj novaĵoj



LA JUNA VIVO

Oficiala organo de

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al

H. Bakker, Kastelenstraat 231,

Amsterdam Z, Nederlando

AGADPLANO POR LA JARO DE INTERNACIA KUNLABORO

Agante en la kadro de la JARO DE INTERNACIA KUNLABORO nia organizo kun ĉiuj siaj organoj, landaj sekcioj, kaj lokaj grupoj klopodu almenaŭ

1. TEJO:

- a) prepari tezon por prelego adapteblan al specifaj cirkonstancoj de junularaj medioj, por helpi al LS kaj LG;
- b) temojn de diskutgrupo de la 21-a IJK kaj oratoraj konkursoj okaze de la 50-a UK kaj la 21-a IJK dediĉi al problemoj de internacia kunlaborado;
- c) unu numeron de la revuo "Kontakto", laŭeble la someran, dediĉi al la internacia kunlaborado de la junularo;
- ĉ) organizi seminarion pri lingva problemo kiel obstaklo en la laboro de internaciaj junularaj organizaĵoj kaj internacia kunlaborado de la junularo, kun partopreno de reprezentantoj de neesperantistaj junularaj organizaĵoj;
- d) kunlabore kun internaciaj fakaj junularaj esperantistaj organizaĵoj (STELO, SAT, LAF, skoltaj, fervojistoj, k.a.) iniciati prelegojn kaj diskutojn pri la problemoj kiujn kaŭzas la lingvodiverseco en la medioj, en kiuj ili agas;
- e) kontakti kun ISMUN kaj laŭeble organizi komunajn aranĝojn;
- f) kontakti kun neesperantistaj internaciaj junularaj organizaĵoj, interŝanĝi kun ili agadplanojn por la Jaro de Internacia Kunlaborado kaj konsideri eblojn de eventuala komuna agado;
- g) organizi kaj instigadi kolektadon de subskriboj por la Propono direktota al UN koncerne la lingvan problemon en internacia kunlaborado, flanke de gejunuloj en la junularaj kaj aliaj medioj ligitaj al la junularo;
- ĝ) klopodi havigi subskribojn de internaciaj junularaj organizaĵoj;
- h) informi al UN pri la agadplano kaj raporti pri plenumitaj laboroj dum JIK;
- ĥ) kolektadi informojn pri plenumado de tiu ĉi plano kaj raporti al la Estraro kaj UEA;
- i) raportadi en "La Juna Vivo" pri la progresado de la kampanjo kaj plenumado de tiu ĉi agadplano.

2. LANDAJ SEKCIOJ:

- a) adapti la tezon por prelegoj pri inter-

- nacia kunlaborado liveritan de TEJO kaj transdoni ĝin al lokaj grupoj rekomdante okazigi prelegojn en lernejoj, junularaj societoj, kluboj, ktp;
- b) dediĉi temojn de seminarioj, renkontiĝoj, diskutgrupoj kaj oratoraj konkursoj al internacia kunlaborado;
- c) unu numeron de la organoj dediĉi al JIK kaj speciale al la internacia kunlaborado de la junularo;
- ĉ) kontakti informajn centrojn de UN en siaj landoj, naciajn ligojn por UN kaj landajn komitatojn por JIK kaj partopreni iliajn aktivecojn en la kadro de JIK, emfazante en konvenaj loko kaj maniero la lingvan problemon;
- d) kontakti landajn junularajn organizaĵojn kaj kunlabore kun ili organizi prelegojn pri internacia kunlaborado kaj lingva problemoj;
- e) speciale kontakti landajn sekciojn de ISMUN kaj kun ili organizi komunajn aranĝojn en la kadro de JIK;
- f) kontakti landajn studentajn organizaĵojn kaj kun ili organizi diskutojn en universitatoj pri la problemoj de la internacia kunlaborado;
- g) klopodi kolekti subskribojn de landaj junularaj kaj studentaj organizaĵoj por la propono al UN;
- ĝ) organizi kolektadon de subskriboj en JG dum la tuta jaro, kontroli ĝin, instigi konstante tie, kie ĝi nekontentige progresas;
- h) havi ĉiam superrigardon pri la aktiveco de JG, JD kaj unuopaj junul(in)oj, informadi pri tio al TEJO, informa centro de UN en la lando kaj la landa komitato por JIK;
- ĥ) raporti en la oficiala organo dum la jaro pri la aktivecoj en la kadro de JIK;

3. JUNULARAJ GRUPOJ:

- a) organizi minimume unu prelegon dum la jaro pri la problemoj de internacia kunlaborado en junulara esperantista medio (lernejo, junulara klubo, societo, k.s.);
- b) dediĉi unu grupan kunvenon al la internacia kunlaborado, UN kaj la Internacia Lingvo;
- c) kontakti klubon por UN, internacia kunlaborado, amikeco, k.s. (kie tia ekzistas) kaj organizi komunajn aranĝojn;
- ĉ) kontakti universitatajn aŭtoritatojn kaj studentajn organizaĵojn en la lokoj kie universitato ekzistas kaj organizi diskutojn pri problemoj de internacia kunlaborado inkluzive la lingvan problemon;
- d) kolekti subskribojn de lokaj organizaĵoj, societoj, junularaj gvidantoj kaj aliaj altranguoj por la Propono al UN;
- e) zorgi ke ĉiu junul(in)o partoprenu kolektadon de subskriboj por la Propono kaj kolektu kiom eble plej multajn;
- f) informadi konstante LS, kie ĝi ne ekzistas rekte TEJO-n, pri progresado en kolektado de subskriboj kaj aliaj aktivecoj ligitaj al JIK.

4. JUNULARAJ DELEGITOJ :

- a) organizi prelegojn pri la problemoj de internacia kunlaborado en junularaj neesperantistaj medioj en lokoj kie JG ne ekzistas;
- b) partopreni en aranĝoj de neesperantistaj organizaĵoj en la kadro de JIK, emfazante la lingvan problemon en la internacia kunlaborado;
- c) kolektadi subskribojn por la Propono al UN;
- ĉ) raportadi al LS, respektive al TEJO, se en la koncerna lando LS ne ekzistas.

La Estraro de TEJO



GRANDA SUKCESO DE LA 8A INTERNACIA SEMINARIO DE GEJ

La 8a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, kiu okazis en Nürnberg de la 27a de decembro 1964 ĝis la 3a de januaro 1965 kaj havis la temon 'Ideologio kaj ŝtato', kunvenigis 127 personojn el 18 diversaj landoj kun tre diversaj konceptoj pri ŝtato, socio kaj ekonomio al objektiva pritraktado de tiu temo, al kiu esence helpis la uzado de la Internacia Lingvo Esperanto kiel sola laborlingvo en prelegoj kaj diskutoj.

La seminarianoj venis el Aŭstrujo, Belgujo, Britujo, Bulgarujo, Danlando, Francujo, Germanujo, Hindujo, Hispanujo, Italujo, Jordano, Jugoslavio, Malio, Nederlando, Svedujo, Svislando, Togo kaj Usono; inter tiuj troviĝis la prezidanto kaj la ĝenerala sekretario de UEA, kvin estraranoj de TEJO kaj multaj konataj agantoj en la junulara movado. La prelegantoj venis el Britujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Jugoslavio, Svislando kaj Usono kaj faris entute 11 prelegojn, kiujn sekvis viglaj diskutoj.

La seminario trovis vastan reeĥon en la publiko. Okazis oficialaj akceptoj fare de la urbestroj de Nürnberg kaj de Fürth. Multaj neesperantistoj ĉeestis en publikaj aranĝoj en ambaŭ urboj. Dum gazetara konferenco Prof. Lapenna aparte atentigis pri la klopodoj enkonduki Esperanton en la lernejoj kaj pri la peticio de UEA al Unuiĝintaj Nacioj. Ĝis la fino de la 8a IS ĉ. 50 artikoloj kaj anoncoj (sole en Nürnberg kaj Fürth ĉ. 20) aperis en la gazetaro; Bavara Radio plurfoje menciis la seminarion. La 14an de januaro "American Forces Network", Frankfurt, radiostacio por la usonaj soldatoj en Eŭropo, disaŭdigis duonhoran programon pri la IS.

Detala raporto aperos en la marta numero de la Revuo.

U. L.

INTERNACIA JUNULARKONFERENCO DE LA FONDAĴO ANNE FRANK 1965

Amsterdam, Domo Anne Frank 25-31 julio 1965

Kiel jam anoncite, la fondaĵo Anne Frank okazigos sian ĉiujaran junularkonferencon por la unua fojo ankaŭ en Esperanto, (krom en la angla lingvo, kiel kutime). De 19 ĝis 25 julio estos anglalingva konferenco, de 25 ĝis 31 sekvos precize la sama programo en Esperanto. La 25-a estos tago komuna al ambaŭ konferencoj. La datoj do estas ŝanĝitaj: ne la unuan semajnon de aŭgusto, sed la lastan de julio vi rezervu por via partopreno! Kotizoj: ĝis 1.IV: 95,— gld. ĝis 1.VII (limdato por aliĝo): 100,— gld. Tio inkluzivos loĝadon, manĝadon, ekskursojn, programon. Loĝado en propra hotelo. Aĝlimoj: 18-30 jaroj. Ceterajn informojn petu al: Anne-Frank-Domo, Prinsengracht 263, Amsterdam C., Nederlando.

Programo: (M = mateno, P = posttagmezo, V = vespero)

DIM. 25 julio: M-diservoj; P-konversacio, boatveturado; V-interkonatiĝo.

LUN. 26 julio: M-oficiala malfermo, kariljono; P-libera; V-prelego.

MAR. 27 julio: M-2a prel.; P-enurba eksk.; V-filmoj.

MER. 28 julio: M-eksk. al Tropika Muzeo; P-3a prel.; V-koncerto.

JAŬ. 29 julio: M kaj P-tuttaga eksk.; V-libera.

VEN. 30 julio: M-4a prel.; P-libera; V-kultura vespero.

SAB. 31 julio: M-5a prel.; P-forumo; V-distra vespero, fermo.

La temo de la prelegoj estas "KOMUNIKADO". La apartaj titoloj estas sinsekve:

1. Informado kaj reagado — komunikado en la materia mondo.
2. Sperto kaj konduto — komunikado en la regno de plantoj kaj bestoj.
3. Kiel la homo povas atingi interhoman kompreniĝon?
4. Rezisto al komunikado.
5. Problemoj de universala lingvo.

Generala enkonduko:

Komunikado estas tre vasta koncepto. Necesas do precizigi la temon. Nia konferenco limigos sin al "homa interkompreniĝo" en la hodiaŭa mondo. Kiel vi povas konkludi el la programo, la prelegoj sinsekvos kiel ŝtupoj de ŝtuparo. Ni konscias, ke malgraŭ la ĉi-supra precizigo estas malfacile, ekzakte redoni la enhavon, sed ni esperas, ke ĝi almenaŭ vekas vian scivolemon kaj la deziron partopreni ĉi tiun konferencon kiu estas speciale grava por vi, geesperantistoj. Internacia lingvo, kiu ajn, sola ne sufiĉas. Por bona komunikado, spirita interkompreniĝo same gravas. Efektive komunikado en ĉi tiu rilato estas la tuto de informado kaj la reago al ĝi.

la juna vivo

esperanto
februaro 1965



50-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Tokio, 31.VII - 7.VIII. 1965

Sub la Alta Protektado de D-ro Yuji Shibata,
Prezidanto de la Japana Akademio.

OFICIALA KOMUNIKO

N. 6 Rotterdam, la 16-an de jan. 1965

Dua Bulteno

La Dua Oficiala Bulteno de la Universala Kongreso estas sendita al la ĝisnunaj aliĝintoj. En ĝi troviĝas la provizora programo, informoj pri la Logiga Servo, Ekskursa Servo, Postkongreso, Infana Kongreseto, Junulara Kongreso, Belarta, Oratora kaj Foto-Konkursoj, Oomoto-Festivalo kaj ĉiuj koncernaj mendiloj.

La Duan Bultenon ricevas nur la aliĝintoj al la Universala Kongreso.

Oficiala Bankedo

La Loka Kongresa Komitato deziras atentigi pri la eksterordinara Oficiala Bankedo de la 50-a Universala Kongreso.

La Bankedo okazos en mirinda japanstila

ĝardeno-restoracio; dum la Bankedo okazos prezentado de japanaj dancoj kaj muziko. Detaloj troviĝas en la Dua Bulteno.

Infana Kongreseto

Jam estas malfermita la aliĝado al la 10-a Internacia Infana Kongreseto, kiu okazos en la kadro de la 50-a U.K.

Kvankam la limdato por aliĝo estas la 30-a de junio 1965, L.K.K. petas la interesigantojn sin anonci jam antaŭ la 30-a de aprilo. Detaloj troviĝas en la Dua Bulteno.

Statistiko (ĝis 16.1.'65):

Alĝ. 1, Arg. 4, Aŭstral. 21, Aŭstrujo 7, Bahamoj 2, Belg. 7, Braz. 9, Brit. 41, Bul. 11, CAR 1, Ĉeĥ. 1, Dan. 15, Finn. 6, Fr. 81, Germ. 40, Hind. 1, His. 6, Hongk. 2, Hung. 5, Irl. 1, Isr. 2, It. 29, Jap. 565, Jug. 10, Kameruno 2, Kan. 4, Mar. 2, Meks. 2, Mon. 2, Ned. 32, Norv. 11, NovZ. 11, Poll. 22, Port. 1, Rum. 1, Sovet. 1, Sved. 47, Svisl. 12, Urug. 3, UAR 1, Usono 44, Venez. 3.

Entute 1069 el 42 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

INTERNACIA EKZAMENO

La Internacia Ekzamena Komisiono denove ekzamenos en Tokio antaŭ la UK. Povas esti allasita nur persono, kiu sukcese finis per diplomo minimume mezgradan lernejon kaj kiu plene posedas la Internacian Lingvon. Ĉiu persono, kiu deziras kandidatiĝi, bonvolu sendi, kiel eble plej frue (limdato la 1-a de majo), al la sekretariino de I.E.K.: esperantlingvan tradukon de la diplomo pruvanta, ke la kandidato finis mezlernejon (la ĝusteco de la traduko devas esti konfirmita de kompetenta instanco) kaj ateston pri sukcese plenumita supera ekzameno de Esperanto en sia lando, aŭ alian pruvon pri plena posedo de la lingvo. La kotizo por la ekzameno estas du usonaj dolaroj (7,20 gld) aŭ ekvivalento, kaj

devas esti pagita samtempe. Kandidato, kiu pro registaraj reguloj absolute ne povas antaŭpagi la kotizon, sed kiu vere atendas ĉeesti la Kongreson, konsultu la sekretariinon, kiu konsideros la eblecon de speciala arango.

Akceptitaj kandidatoj ricevos specimenajn demandarojn kaj pli detalajn informojn.

Laŭ la Regularo de IEK, sukceso en la ekzameno devas "atesti, surbaze de rigora ekzameno, la kapablon instrui Esperanton je supera nivelo". Kandidatoj do atendu ekzamenon, kies kriterioj similas tiujn por universitata diplomo. Sekretariino: F-ino Marjorie Boulton, 1 Inglefield Avenue, High Lane, Burslem, Stoke-on-Trent, Staffs., Anglujo. Informpetantoj bonvolu sendi int. respond-kuponon.

MEMORIGA KALENDARO

Marto

- 28 Dana Kongreso, Helsingør
- 31 Limdato Belartaj Konkursoj 1965
Kotizoj 50-a UK Tokio plialtiĝas

Aprilo

- 5-18 Argentina Kong., Rio Cuarto
- 9-17 Int. kultura semajno, Grésillon
- 16-19 Brita Kong., Stoke-on-Trent
- 30 Limdato kandidatiĝo Int. Ekzameno

Majo

- 22-28 IFEF-Kongreso, Hamar, Norvegujo

Junio

- 5-7 Belga kongreso, Ostende
- 5-7 Germana Kongreso, Düsseldorf
- 5-12 Int. Junulara Kunveno, Düsseldorf
- 19-22 Skandinavia Kongreso en Oslo
- 30 Limdato aliĝo UK Tokio

Julio

- 1 Limdato foto-konkurso 1965 (UEA)
- 4 Sezono Grésillon komenciĝas

- 9-10 Inaŭguro E-Monumento Linz
- 11-17 Eŭropa E-Konferenco, Vieno
- 18-14/8 Somera E-Tendaro, Lančov, Ĉeĥos.
- 20-24 Hispana Kongreso, Palencia
- 23-26 ELNA-Kongreso, Portland, Oregon
- 24-31 KELI-kongreso, Boldern, Svislando
- 25-31 Int. Junulara Konferenco, Amsterdam
- 25-1/8 STELO-semajno, Balaton, Hungarujo
- 31-7/8 50-a UK, Tokio
- Aŭgusto**
- 1-8 SAT-Kongreso, Karlsruhe, Germ.
- 8-13 Postkongresa ekskurso, Kansai-dist.
- 8-15 IJK de TEJO, Oocu, Japanujo
- 10-20 Int. Pedago E-Tendaro, Szeged, Hung.
- 13-15 Int. Festivalo de Oomoto, Kameoka
- 13-20 Dua Konf. de Lernejoj, Bishop's Stortford
- Septembro**
- 12 Sezono Grésillon finiĝas
- 24-26 Nederlanda Jub. Kongreso, Amersfoort
- Oktobro**
- 16-23 Brazila E-Kongreso, Rio de Janeiro

Informojn pri radio sendu al S-ro G. Lar-
glantier, 29 Bd. Murat, Paris 16, Francujo.

Por pliaj detaloj vidu la januaran numeron.

Ĉina Radio. La pasintan 19-an de Decembro okazis la unua esperantlingva disaŭdigo el Radio Pekino. Programo de informoj kaj muziko nun estas dissendata ĉiuvendrede kaj ripetata ĉiusabate de 20.00 ĝis 20.30 G.M.T. per ondoj 51 m. (5880 kcs), 40.40 m. (7440 kcs), 30.10 m. (9955 kcs). Aŭskultantoj estas invitataj sendi siajn rimarkojn pri aŭdebleco kaj opiniojn pri enhavo de la programo al: Radio Pekino, Esperanto-Fako, Pekino, Ĉinujo.

Radio Praha. 25-II, Juna generacio en Esperanto-movado; 25-III, Vojaĝimpresoj el Jugoslavio.

Radio Roma. Vidu detalan programon en la januara numero.

Pola Radio en Gdańsk jam de kvin jaroj daŭre dissendadas matenan programon ĉiulunde de 6.15 ĝis 6.30 per ondo 230 m. (1304 kcs). La stacio estas aŭdebla eksterlande, precipe en norda, centra kaj orienta Eŭropo. Leteroj de aŭskultantoj estos bonvenaj. Skribu al: Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk, Pollando.

Radio Bern. La Svisa Kurtonda Radio-Stacio komunikas, ke la elsendoj komencitaj en 1947 en Esperanto estas ĉesigitaj ekde la komenco de 1965 pro financaj motivoj. La aŭskultintoj de tiu programo povas esprimi sian opinion pri la ĉesigo, skribante al: Direkcio de Studio des ondes courtes, Bern, Svislando.



LA POSTMARKKOLEKTADO

En 1964 kreskis denove la sumo enveninta por vendo de poŝtmarkoj, nome ĝis 2250 d.kr. aŭ 130 kr. pli ol en 1963. Tiu sumo egalas al 1200 gld. Kaŭze de pli racia organizado kaj vendado de la poŝtmarkoj, ni povas atendi, ke tiu ĉi monsumo en 1965 kreskos ĝis la duobla. Ni apelacias al la kontribuantoj daŭrigi la kolektadon. Estas tiel, ke daŭre estas deko da esperantistoj, kiuj sendas tre multajn. Sed ne estas la samaj personoj. Ni sugestas, ke tiuj antaŭaj fervoraj kontribuantoj interesiĝu denove.

Kiel kutime la nov-zelandaj esperantistoj kontribuis per pli ol la duono, kaj rekompence UEA donacis kiel premion ekzempleron de la

"Dia Komedio". Organizas la kolektadon tie, kaj sendas al mi, la sinjorinoj Rita Aagaard kaj Y. M. Canty.

Dua premio: s-ro S. Bale, 79 Grove Rd., Windsor, Berks., Anglujo.


Tria premio: Oomoto, Kameoka, Japanujo.

Kvara premio: s-ino W. Addis, 25 Greville Ave, Flinders Park, Sud-Aŭstralio.

Kvina premio: s-ro Alex Taŭsciuc, Bubu, Dr. Istrate 12 etaj., Bukarest 28.

Akceptas daŭre ĉiaspecajn poŝtmarkojn:

Peter Zacho, Fredensvej 9,
Espergaerde, Danlando.



EN LA GRUPOJ

Jen kelkaj sugestoj por agado de lokaj grupoj dum la venontaj monatoj:

1. Daŭre kolekti subskribojn por la Propono al UN, kaj zorgi, ke ĉiam estu riceveblaj en la kunvenejo subskribo-folioj kun aldonita nacilingva teksto. (Vidu p. 25)

2. Organizi specialan vesperon aŭ ekspozicion pri difinita temo aŭ lando, kolektante materialojn pere de la Internacia Lingvo. (Ekzemple, speciala finnlanda vespero okaze de la apero de Kalevalo en Esperanto, kun elmonro de finnaj popolartaĵoj, literaturaĵoj, k.s., eventuale kun invito al ambasadoro aŭ alia.)

3. Skribe kolekti kaj distribui inter la grupanoj turismajn prospektojn el diversaj landoj, antaŭvide al la venontaj libertempoj. (Vidu p. 33, sub "Turismo").

4. Aranĝi specialan lingvo-kritikan kunvenon, en kiu la grupanoj reciproke atentigu pri kutimiĝintaj "personaj" eraroj.

Cetere ĉiam agi laŭ la rekomendoj de la Dua Baza Laborplano de UEA (ricevebla de la C.O. en Rotterdam), la Laborplano por la Jaro de Internacia Kunlaboro ("Esperanto" 1965 januaro p. 2), kaj laŭ la serio da artikoloj "Pri la agado de la lokaj grupoj", el kiuj la n-ro 1 aperas nun sur p. 22.

WILLIAM E. BAFF (1888-1964)

La usona pioniro William E. Baff mortis en Washington la 9-an de decembro. Li eklernis Esperanton en 1905, fondis la unuan klubon en Usono, kaj aliĝis al UEA tuj post ĝia fondiĝo en 1908. Li renkontiĝis kun Zamenhof en la jaro 1910, en la kongreso en Washington, kie li poste ĝis sia morto servis kiel delegito de UEA.

S-ro Baff naskiĝis en Usono, sed lia patro devenis el Bjalistok, la naskiĝurbo de Zamenhof. En la somero de 1964 lia sanstato malboniĝis, kaj li decidis viziti Eŭropon antaŭ

sia morto. Li do entreprenis sep-semajnan vojaĝon. La vojaĝo estis malfacila pro lia kormalsano, sed ĉie la esperantistoj multe helpis lin. Antaŭ la morto li petis, ke oni sendu liajn dankojn al ĉiuj, kiuj tiam helpis lin.

GERRIT VAN HEEK (1887-1964)

Je la 11-a de decembro forpasis 77-jara s-ro Gerrit van Heek, en Hengelo, Nederlando. Jam dum jardekoj li donis gravan financon subtenon al diversaj gazetoj kaj organizaĵoj, kaj en la lasta tempo donacis konsiderindajn sumojn al UEA.

nekrologoj

esperanto
februaro 1965

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1964

Stato je la 31-a de Decembro

Konkurso I

Lando	kvoto	poentoj	%
1. Hispanujo	2660	2804	105,41
2. Japanujo	3690	3745	101,49
3. Italujo	4210	3932	93,40
4. Brazilo	3694	3411	92,34
5. Germanujo	7141	6551	91,74
6. Britujo	6691	6053	90,46
7. Francujo	7752	7009	90,42
8. Danlando	3099	2704	87,25
9. Svedujo	7180	6190	86,21
10. Belgujo	2055	1770	86,13
11. Nederlando	5975	5140	86,03
12. Norvegujo	1755	1490	84,90
13. Usono	4526	3827	84,56
14. Finnlando	3160	2365	74,84
15. Svislando	2459	1800	73,20
16. Jugoslavio	5375	3295	61,30

Konkurso II

Lando	kvoto	poentoj	%
1. Argentino	810	760	93,83
2. Israelo	460	405	88,04
3. Aŭstralio	1475	1288	87,32
4. Islando	250	210	84,—
5. Kanado	842	702	83,37
6. Novzelando	1481	1195	80,69
7. Portugalujo	485	380	78,35
8. Aŭstrujo	1430	1090	76,22
9. Madagaskaro	250	166	66,40
10. Sudafriko	250	135	54,—
11. Urugvajo	250	125	50,—

Ni kore gratulas la venkintojn, Hispanujo kaj Argentino, pro tiu bonega rezulto kaj varme dankas iliajn energie funkciajn ĉefdelegitojn, S-rojn R. Molera en Hispanujo kaj C. Milkuschutz en Argentino. Ili modele montras kio estas atingebla per senlaca klopodado, ĉar ambaŭ landoj estis venkintaj jam pli frue

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la fino de decembro kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de decembro 1963:

	1963	1964
Asociaj membroj	26 392	25 167
Individuaj membroj		
MJ	859	879
MA	5328	4929
MS	479	367
Pat	1	1
DM	533	553
HM	39	35
J-MJ	30	39
J-MA	171	208
MA-K	—	120
	7 440	7 131
Entute	33 832	32 298

KOMENTO PRI LA STATISTIKO

Vidante la statistikon pri la nombro de la membroj de UEA je fino de 1963 kaj je fino de 1964, ĉiu kun bedaŭro konstato, ke ne nur

en la lasta jarkvino, Hispanujo en 1959 kaj Argentino en 1962. Kiel kutime, je ilia dispono estas libro-premio en valoro de po 100,— gld.

Aparte malfacila estis ĉi-jare la tasko pasi la kvotojn, kiuj estis nekutime altaj pro la lastjara alfluo de dumvivaj membroj. Ne mirige, do, ke nur kelkaj landoj atingis pli ol 100%. Gratulindaj certe estas ankaŭ tiuj, kiuj venis tre proksime al tiu limo, ĉar signifas ke ili atingis preskaŭ la saman poentaron kiel pasintjare, nun sen tiuj favoraj saltoj pere de DM. Pli evidenta tio fariĝas, se oni konsideras, ke en 1964 estis enskribitaj 20 novaj DM, dum en 1963 tiu kategorio kreskis per 98 DM, dank' al la specialaj cirkonstancoj antaŭ la kotizaltigo. Kompreneble, ankaŭ tiu lasta faktoro havis iom da influo, sed ne tre multe, ĉar ĝi sentigis sin pleje en landoj kiuj ne partoprenas la Konkursojn.

Por la nunjaraj Konkursoj la antaŭvidoj povas esti sufiĉe bonaj. Tutcerte multaj denove pasos la limon de 100%, kun ĉies energia helpo, laŭ la kutima konkursa fluktuo. Niaj perantoj streĉe varbu en ĉiuj membrokategorioj — kaj kun speciala energio revarbu ankaŭ iamajn membrojn — en la Jaro de Internacia Kunlaborado.

La Novaj Konkursoj

La konkursoj 1965 okazos laŭ la kutima sistemo. La atingita nombro de poentoj en la fino de 1964 estas la kvoto por 1965, kun minimumo de 250. En Konkurso I partoprenas landoj kun pli forta, en Konkurso II landoj kun malpli forta movado. La poentoj estas donataj laŭ jenaj valoroj: AM = 1 poento; MJ kaj J-MJ = 5 pt; MA, MA-K kaj J-MA = 10 pt; MS = 15 pt; Pat kaj DM = 50 pt.

Grandajn rezultojn al ĉiuj deziras

M. H. Vermas,
Direktoro C.O

la nombro de la individuaj membroj malkreskis, sed ke malkreskis la nombro de la asociaj membroj. Necesas fari ian klarigon tiurilate. UEA estas organizaĵo, kiu rigore nombras siajn membrojn. Nur tiuj estas kalkulitaj kiel ĝiaj membroj, kiuj jam pagis la kotizon. (Mi el propra sperto scias, ke, almenaŭ en mia lando, ne ĉiuj organizaĵoj tiel rigore kalkulas.)

En 1964 unu el la grandaj landaj asocioj, de lando, kiu havas devizajn malfacilaĵojn rilate al sendo de mono al Rotterdam, ĝis nun sendis ankoraŭ nur parton de la kotizoj por asociaj membroj. Ni esperas, ke tiu mono ankoraŭ venos.

Sed la nombro de la individuaj membroj malkreskis. Kion diri pri tio? Nu, vi scias, ke ek de 1964 la kotizoj por individuaj membroj estas plialtigataj per unu triono. Kiam la Estraro faris la proponon pri la plialtigo kaj la Komitato ĝin akceptis, ĉiuj sciis, ke preskaŭ certe ni perdos membrojn. Ni taksis la malkreskon je 5 ĝis 7%. Kvankam mi ĉiam en 1964 esperis, ke fine la nombro de la nov-aligintaj

membroj estos same alta kiel la nombro de tiuj, kiuj en 1964 malaperis el niaj vicoj, mi devis konstati, ke la rezulto estas 309 individuajn membrojn malpli. Tio estas 4,2 %.

Ĉu tute ne estas ia ĝojiga fakto en la ciferoj? Tamen jes! Estas du.

Unue, je la fino de 1964 ni havis 328 gejunulojn kiel individuajn membrojn J-MA kaj MA-K. La Estraro de TEJO promesis fari ĉion por ke tiu nombro fariĝu almenaŭ 600; pli ol la duono estas atingita nun, post la aranĝo en Sofio, kaj mi rajtas fidi, ke ĉiuj TEJO-membroj faros en 1965 sian eblon, por ke baldaŭ la provizora celo estu atingita.

LA CENTRA OFICEJO KAJ CED DANKAS

Je la fino de 1964, kiel ĉiujare, multaj membroj kaj organizaĵoj plezurigis nin per bondeziraj kartoj kaj leteroj. Bedaŭrinde, ilia nombro estas tro granda, ol ke ni povus persone respondi al ĉiu individue, kaj tial ni petas la salutintojn, kiel ankaŭ ĉiujn membrojn kaj legantojn, akcepti komune varmajn bondezirojn por sukcesa laboro en 1965.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Albault, d-ro A., Toulouse, Francujo.
Gnagy, s-ro W. L., Juneau, Usono.
Saville, s-ino Ida, Los Angeles, Usono.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1965

26. Klumair, s-ro Karl, Aŭstrujo; 27. Boeren, s-ro M., Belgujo; 28. Crabtree, s-ro E. P.; 29. Dunbar, s-ro R.; 30. Hanson, s-ro C. G.; 31. Kennedy, s-ro D.; 32. Kennedy, s-ino M.; 33. Miller, s-ro J. R.; 34. Shield, s-ro W. J., Britujo; 35. Andresen, s-ino Hilkkä-Liisa; 36. Andresen, s-ro Søren; 37. Blume-Jensen, s-ro Arne; 38. Frey, s-ro Hans H.; 39. Jensen, s-ro J. P.; 40. Kehlet, s-ro Torben; 41. Kustos, s-ro G.; 42. Lange, s-ro Otto C.; 43. Trier, s-ro Bent Sej, Danlando; 44. Pyykönen, s-ro Juho; 45. Vilkkä, s-ro Joel; 46. Vuori, s-ro A., Finnlando; 47. Agourtine, s-ro L.; 48. Belhoste, s-ro L.; 49. Bernard, s-ro R.; 50. Dabiez, s-ro H.; 51. Larglantier, s-ro Georges; 52. Llech-Walter, s-ro R.; 53. Pera, s-ro Jean; 54. Philippe, s-ro H., Francujo; 55. Gieseler, s-ro Walther, Germanujo; 56. Pacelli, s-ro Giuseppe; 57. Sgroi, s-ro Rosario, Italujo; 58. Clark, s-ro Harry E., Kanado; 59. Baaten, s-ro W.; 60. Douma, f-ino J. S.; 61. Kat, s-ro F. H.; 62. Laverman, f-ino A. A.; 63. Luyke, s-ro H. C.; 64. Mast, s-ro J. L.; 65. Muller, s-ro J. L., Jr., Nederlando; 66. Maarli, s-ro E., Norvegujo; 67. Ahlin, s-ro E. V.; 68. Ahlström, f-ino Maja; 69. Almén, s-ro Helmer; 70. Andersson, s-ro Bror; 71. Andrén, s-ino Ester; 72. Brandemar, s-ro Nils; 73. Colliander, s-ino M.; 74. Dahl, s-ro Einar; 75. Emson, s-ino R.; 76. Fingalsson, s-ro B.; 77. Frithiofson, s-ro Tage; 78. Frode, s-ro O.; 79. Gustafsson, s-ro Karl E.; 80. Helm, s-ro Axel; 81. Jensie, s-ino Märta; 82. Johnsson, s-ino Margareta; 83. Julin, s-ro Teodor; 84. Karlsson, s-ro Henrik; 85. Lagerkrantz, s-ro L.; 86. Lind, f-ino Estrid;

Due, la nombro de la DM denove kreskis, en 1964 per 20. Fine mi direktas min al ĉiuj legantoj, junaj kaj maljunaj: se vi havas monon kaj povas sendi monon al Rotterdam, fariĝu DM (Dumviva Membro) de UEA. Vi pagas nur unufoje 400,— guldenojn! Tiu ununura pago ŝparos al vi ĉiujn zorgojn rilate al kotizpagado al UEA dum via tuta vivo kaj ĝi ŝparos al UEA multan administran kaj librotenanadan laboron ĉiujare. Do profiton ambaŭflanke!

Via estrarano pri financoj,

E. J. Woessink

87. Lindberg, s-ro Erik; 88. Lundgren, s-ro A.; 89. Mellberg, f-ino G.; 90. Möllestad, s-ro Sven; 91. Olsson, s-ro Hj.; 92. Palmgren, s-ro Rune; 93. Pettersson, s-ro Folke; 94. Svärd, s-ino Rut; 95. Wedholm, s-ino Anna; 96. Wingefalk, s-ro Rune, Svedujo; 97. Baur, d-ro A.; 98. Bouvier, s-ro P.; 99. Grütter, s-ino L., Svislando; 100. Beard, s-ro Ralph H.; 101. Becquet, s-ro C. A.; 102. Belinfante, d-ro F. J.; 103. Calvert, s-ro Eugene; 104. Crane, s-ro Clarkson; 105. Dormont, s-ro Louis; 106. Gerber, s-ro Wm.; 107. Lieberman, d-ro E. James; 108. Mohacsy, d-ro Joseph; 109. Nace, s-ro Paul E.; 110. Neri, s-ro Raymond R.; 111. Schackmann, s-ro J. H.; 112. Simon, s-ro W.; 113. Solzbacher, d-ro William; 114. Young, s-ro Alton, Usono.

DONACIOJ GENERALA KASO

Kuttelwascher, s-ro O., Aŭstrujo: 0,69 gld.
Tanner, s-ro H., Munkeno, Germ.: 8,73 gld.
Gonzalez Cantero, s-ro P., Hisp.: 0,85 gld.
N.N., Nederlando: 200,— gld.
Schaufelberger, s-ro W., Svislando: 16,68 gld.
Futran, s-ro John, New York: 8,57 gld.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO)

Beck, s-ro E. H., Britujo: 10,— gld.; Kehlet, s-ro Torben, Danlando: 7,50 gld.; Gründler, s-ro Martin: 10,— gld.; Knobloch, s-ro Fr.: 5,— gld. (ambaŭ Germanujo); Terrazzani, s-ino Spadaro, Italujo: 3,— gld.; Beekhuysen, s-ro B. R.: 10,— gld.; Duyvetter, s-ro J. G.: 5,— gld.; Graaf, s-ro A. v. d.: 2,50 gld.; Jonge, f-ino C. de: 7,50 gld.; Kat, s-ro F. H.: 20,— gld.; Kliphuis, f-ino B. F.: 10,— gld.; Koopmans, f-ino B. A.: 13,80 gld.; Kos, s-ro K.: 25,— gld.; Lek-Muns, s-ino N. v. d.: 5,— gld.; Linde v. d. Meer, s-ino E. C. v. d.: 5,— gld.; Slösser-Bresler, s-ino B. M.: 2,50 gld. (ĉiuj Nederlando); Anderson, s-ro Gustav, Svedujo: 10,41 gld.

Sumo entute ricevita: 15 361,99 gld.

Sumo elspezita: 13 822,02 gld.

Saldo pozitiva: 1 539,97 gld.

DONACO INTERNACIA ARTA TEATRO

Régulo Pérez, s-ro J., La Laguna: 11,25 gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

esperanto
februaro 1965

Sub la signo de la verda stelo

19 diverslandaj gesamideanoj rakontas interesaĵojn el sia Esperantista vivo, i.a. Setälä (Finnlando), Faulhaber (Nederlando), Rosbach (Norvegujo), Murphy (Anglujo), Ota Ginz (Israelo), Corso (Italujo), Kustos (Gronlando), Heinrich Müller (Germanujo). 72 pĝ. Formato 15 × 21 cm. Prezo 6,50 dkr. (= 1 us. dol. = 14 steloj). Havebla ĉe Libro-servo de U.E.A. aŭ rekte ĉe

Dana Esp. Eldonejo,
Ingemannsvej 9, Åbyhøj, Danlando.

NB. Ni planas duan volumon kaj petas materialon pri "Interesaĵoj el via Esperantista vivo", maksimume 4-5 paĝoj po 300 vortoj en ĉiu kontribuo.

JAM AĈETEBLA !

bela tolbindita volumo daŭre konservinda enhavanta la kompletajn jarkolektojn de

ESPERANTO kaj MONDA KULTURO, 1964

412 paĝoj, 149 ilustraĵoj, ora surpriso

Por MA de 1963: 12,50 gld.
Por aliaj: 20,00 gld.

Nebindita jarkolekto de "Monda Kulturo" 1964 aŭ 1963: nur 10,- gld.

Je la samaj favoraj prezoj estas ankoraŭ aĉetebaj kelkaj ekzempleroj de la kunbinditaj jarkolektoj 1963. Mendu tuj ĉe la Centra Oficejo en Rotterdam.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, Clermont-Fd. (PdD) Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Internacian kongresatmosferon vi ĝuos Pentekoston 1965. Aliĝiloj haveblaj kaj por kvin respondkuponoj: 36 glumarkoj, bele afrankita unuatagkoverto kun esperantlingva poŝtstampo ĉe Germana Esperanto-Kongreso, Düsseldorf, Herzogstr. 79.

Zamenhof-glasoj por 2 gld. aŭ 8 steloj samspecaj kiel la dumkongrese venditaj, ankoraŭ livereblaj de D. Goslinga, Maliestraat 11, Utrecht, Nederlando. Poŝtĉekkonto 537731.

Sendu al mi belajn bildkartojn de via lando; mi tuj rekompencos per bildkartoj de Roma, Napoli, Firenze, Venezia... laŭ via deziro. Bagnis Romano, Salesiani, Pietrasanta (Lucca), Italujo.

Per magnetofonbendoj interŝanĝus studentajn kulturprogramojn, raportojn en Esperanto hungara mezlernejo. Oni skribu amase al la gvidanto, kiu preparas la enkondukon de deviga lingvoinstruado: Géza Domonics, Dunaujváros, Gimnazio, Hungarujo.

"Kiel trovi akvovejnon?" Rakontu al ni pri la pli malpli magiaj metodoj, kiujn oni uzis antaŭe aŭ eĉ ankoraŭ uzas en via hejmloko. Ni diskutos la temon la 31-an de marto. Skribu al: Studenta Esperantoklubo, p/a Johansson, Kastanjegatan 1 A : 103, Lund, Svedujo.

Düsseldorf, la plej moderna urbo de Okcident-germanujo invitas vin al Germana Esperanto-Kongreso, Herzogstr. 79, Pentekoston 1965. Esperantlingvaj urbprospektoj sendas: Werbe- und Verkehrsamt Düsseldorf, Ehrenhof.


Infanrimoj bezonataj. Ĉu vi havas infanrimojn, -versojn, -kantetojn kaj similajn en Esperanto? Mi petas, ke vi sendu ilin al mi por mia propra uzo, perado kaj eventuala publikigo. Represo petata. S-ro Bertil Nilsson, Rödkullastigen 2 A, Malmö S, Svedujo.

Geonkloj Esperantistaj helpas la infanojn de nia movado per korespondado. Petu detalojn. 3 Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Britujo.

Deziras belajn uzitajn tutmondajn poŝtmarkojn kontraŭ hindaj aŭ donace profite al la esperanta movado en Hindujo: Esperanta Filatela Servo, P.B. 604, New Delhi-1, Hindujo

30-jara fraŭlo oficisto deziras korespondi kun geamikoj tutmonde. Interesiĝas pri turismo Nikola Golić, Trojstvo, Hrvatska, Jugoslavio.

Ĉu vi kolektas poŝtmarkojn, monerojn, antikvaĵojn, fervojbiletojn, aŭ malplenajn bierbotelojn? Vastigu viajn horizontojn! Ĉi-jare kolektu ankaŭ subskribojn por la Propono al Unuiĝintaj Nacioj! Petu senpagajn subskribofoliojn de via landa asocio aŭ rekte de la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.



YTONG®

konkeras mondan merkaton

YTONG - sveda letbetono -
gajnas terenon tra la mondo.

YTONG - portkapabla kaj
izola.

Facile prilaborebla,
volumene konstanta kaj daŭra.

Kvalitaĵo - la ĝusta materialo
por ekonomia konstruado.

YTONG INTERNATIONAL AB

Lagerlöfsgatan 8

Stockholm K, Svedujo

Anonco per




EKI

Por mi la nomo signifas Kvalito !

ANTAŬ KELKAJ NOKTOJ, veturante hejmen, malfrue kiel kutime, mi ekrimarkis ke la stratlumigo estas pli brila. Kaj hieraŭ mi legis en la gazeto ke Philips instalas ĝin. Por la unua fojo mi eksciis ke Philips produktas ankaŭ stratlumigilojn. Vere, oni lernas ĉiutage!



KIE MI LABORAS NI UZAS PROJEKCILOJN DE PHILIPS. Elstaraj ekzemploj de moderna faksperiteco. Kaj sciu, pri kino-projekciiloj ne ekzistas por mi sekretoj. Ekipaĵoj de Philips estas uzeblaj en preskaŭ ĉiuj modernaj kino-sistemoj.



KIAM MI DECIDIĜIS AĈETI MAGNETOFONON por mi mem, jam antaŭe mi sciis kiun markon prefere akiri. Philips, kompreneble! Tute kiel mi atendis, la funkciado estis sendifekta kaj ĝia manipulado facila. Krome, mi estas ĉiam certa pri bonega teknika servo, kiun Philips, ĉie en la mondo, metas je dispono.



fido al **PHILIPS** estas tutmonda



Okupante preskaŭ 250.000 kunlaborantojn, Philips estas unu el la plej grandaj elektronaj industrioj de la mondo. Propraj naciaj organizoj en 55 landoj, agentoj en 115 merkatoj.

LUMO, SONO, RADIO, TELEVIDO, MASTRUMAJ APARATOJ, GRAMOFONDISKOJ, TELEKOMUNIKADO, KEMIAJ KAJ FARMACIAJ PRODUKTAĴOJ, MEDICINAJ, INDUSTRIAJ KAJ SCIENCAJ APARATOJ KAJ ELEKTRONAJ KONSTRUPARTOJ.